

	<h1>PENSEO</h1>	<i>N-ro 183</i> <i>Jan./2007</i>
	Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994	
Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 18-a jaro http://www.elperno.net/penseo/penlisto.htm		

Vejdo

Novjara Ben'

—laŭ ĉinesko Qinyuanchun

nova jaro
 freŝa starto
 plua progres'
 por nia afer'
 vigla forto
 streĉa peno
 sen ajn forges'
 propagando
 praktikado
 vokas al plia neces'
 antaŭen
 ni kune marŝu
 nenia ĉes'

 konduto sen eksces'
 modesto
 elstara impres'
 nenia altrud'
 pacienco
 klarakape
 kora konfes'
 diligente
 fideleme
 pripenseme en promes'
 bondezir'
 al niaj s-anoj
 por fin-sukces'

*Qinyuanchun: ĉina fiksoforma poemo el du strofoj po 13 versoj de 444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxxa,xxa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)

Fluto kaj Amo

Xiao Chentu

Polvulo, mia najbaro diris, ke li jam rakontis tiun anekdoton ne malpli ol cent fojojn, sed neniu kredis pri tio. En lia insista priskribado en la rakonto, blindulo estas absorbita de flutludado kaj el tio havigis al si svagan amon.

Kun ruĝetaj okuloj, Polvulo ofte kraĉis en sian manon kaj rekulpis sian manikon por fari veton al tiuj, kiuj ne kredis lin. Ĉu vi aĉetu por mi botelon da vino kaj kilogramon da kuirita viando, se tio estas vera?

Posttagemeze de tiu tago, mi ne faris veton kun Polvulo, sed mi aĉetis kilogramon da kuirita porkkapa viando kaj botelon da alkoholaĵo.

Laŭ la zigzaga vojeto kun humida aero, Polvulo diris al mi, ke la loĝejo, kies mastron mi volas viziti, estas proksima.

En la tegoldomo apud la rivero, mi laŭdezire vidis tiun blindulon.

Tirante me je la mano, Polvulo petis, ke mi priskribu la dancistinojn por li. Mi kapjesis.

Mi donacis al la blindulo la fluton, kiun mi speciale aĉetis en la muzikila butiketo. Li ne rifuzis. Post iom da pripenso, li diris, "Mi pensas, ke vi volas min ludi fluton? Ĝi estas tre valora donaco!"

Mi iom levis mian korpon kaj hasteme respondis, "Mi preferas naciajn muzikilojn, sed mi ne havis ŝancon por lerni. Hodiaŭ mi venas ĉi tien por aŭdi vian muzikon!"

Alnaĝis apenaŭ videbla rideto al lia vizaĝo. Kun klinita kapo, li ekpalpis kaj elprenis fluton el la litrando.

Vere rara estis la fluto, farita el jado, kiu briletis verde en la nesufiĉe prilumigita ĉambro.

Li diris, ke oni devas bruligi inceson, ĉiufoje kiam li ludas fluton, kaj demandis, ĉu mi kutimiĝas al laodoro de incenso. Mi hasteme respondis, "Laŭ via plaĉo!"

La fluta muziko softe kaj malrapide fluas kiel fadenoj tra miajn travivajxojn kaj mian menson, kondukante min al la blanko neniam nekonata de mi. Mi vidas la plej belan knabinon, kiu tordas sian sveltan figuron ĝuste antaŭ miaj okuloj.

Mi ne sciis, kiam li jam ĉesis fluti, mi tamen ne povis eltiri min el la ĝuado de mirinda situacio.

Mi ekpuŝis Polvulon, kiu tuj vekigis kaj eligis ekkrion. Ankoraŭ kun larmoj en la okuloj, li proksimigis sian korpon al mi, dirante, ke li ĉiufoje certe gajnas la veton pri la blindulo.

Irante survoje, mi aŭdis la babilon de apudstarantoj, "Eblas, ke tiuj du viroj vizitis la frenezulon."

"Frenezulo?" mi demandis strange, "Kiu estas frenezulo?"

"Tiu estas la blindulo. Ĉu tage aŭ nokte, li senĉese flutadas," diris maljuna virino. "Vere ĝena! La samajn melodiojn li flutadas. Oni diras, ke li flutadas por lia amatino! Sensencaĵo! Kiu knabino volantas edziniĝi al blinda frenezulo!"

Survoje mi sentis min melankolia. Tiel belsona fluta muziko eĉ kaŭzis malagrablajn al tiuj babilantoj.

Kiam ni revenis al la loĝejo de Polvulo, li daŭrigis, "Ĉu vi volas scii, pri kio la blindulo okupiĝis antaŭe, frato?"

Tiuj vortoj tuj vekis mian scivolemon. Li diris, "Mi rakontu al vi, se vi regalos min per alia botelo da vino!"

Sciante pri lia ŝerco, mi ĵetis koleretan ekrigardon al li, "Fripono, vi ne scias la kialon ĝis kiam vi ebrigiĝas pro alkoholaĵo!"

Kun serioza mieno, li bruligis cigaredon kaj diris emocie, kun larmoj en la okuloj, "Antaŭ longe, la blindulo enamiĝis al knabino, kiu estis lerta en flutado kaj ellernigis al li flutadon. Poste mi aŭdis, ke ŝi irigos lin por partopreni en konkurso. Divenu, kio okazos?"

Pro maltrankvilo, mi piedfrapis lin, "Fripono, se vi denove interrompas vian rakontadon, mi ĵetos vin en Huangpujiang-riveron kiel nutraĵon por fiŝoj"

"Sciu, ke la knabino suferis de osta kancero. Kiel kruela tio estas por bela knabino! Oni eĉ volas amputi ŝiajn ambaŭ gambojn formortintajn! Sed, ŝi kaŝis sian malsanon kaj, kun granda doloro, ellernigis la blindulon en flutado." Kiam li diris tiujn vortojn, liaj larmoj perlis senbride.

Ankaŭ mi ne povis sinteni, kaj miaj okulvitroj malklariĝis pro larmoj. "Kaj poste?" mi demandis per voĉo de plorsingultado.

"Poste, la knabino kun ambaŭ gamboj amputitaj ankoraŭ ne sukcesis eskapi de parco. La demonaj ĉeloj de kancero disvastiĝis..." laŭte ploregis Polvulo.

Mi silentis longan tempon, rigardante lin drinki vinon tason post taso.

Ĉe adiaŭo, li akompanis min ĝis la pordo. Li diris, kun ebriaj okuloj, "La blindulo estus fariĝinta mia bofrato! Mi deziregus zorgi pri li anstataŭ mia mortinta fratino!" Lia voĉo tute raŭkiĝis.



elĉinigiŝ Samio

Bonkoro (Gu Cunhua)

Al karulino

Mi ja petis vian manon,
La respondo: bonan sanon;
Mi redonis al vi floron,
Ĝi alportis la doloron.

Ĉu vi konas mian koron?
Ĉiu havas la laboron.

La aŭtuno tuj alvenos,
Tempo faras veran oron.

06.12.2 en Chongqing

Atendu vi trankvile*

Al Thukuru (Faro)

Atendu vi trankvile, Faro.
La mondo revoluas por vi;
Ekĝoju kun rideto, Faro,
Volonte ni ja servas al vi.

Banejo ĉe la terma fonto,
Arbaro sur la alta monto,
Fiŝkaptado ĉe la klara lago,
Ĉi tiuj—al la gaja fonto.

Atendu vi trankvile, Faro,
Mirinda belpejzaĝo por vi,
Antikva nia tero, Faro,
Donacu drogan herbon al vi.

3.12.2006 en Chongqing

*Mia japana amiko Thukuru suferas iun malsanon. Por konsoli lin mi verkis tiun chi poemeton.

Ĉineske

Eto

Malsaĝa Avo

(ĉina legendo)

—laŭ ĉinesko Manjiaŝong*

I
antaŭ longe


du montoj
staris en bar'
al la voj'
de homoj ĉar
ili devis grimpati
transen kun peniga far'
decidon
faris Malsaĝ-Av'
en val'

deloki
per fos-fal'
la montojn
kun idar'
tuj sekvan tagon
fosa prepar'
finitis, kaj ekis do
entrepreno sen erar'
laŭplane
malgraŭ sang-ŝvita
malavar'

II

tag' post tago
kun alta
ambicio
per hojoj
ŝpatoj, lia
familio
okupiĝis pri l' fosad'
kun granda energio
saĝuloj
deadmonis kun
racio

daŭre kun
defio
laboris
la dio
potenca gigant'
pri misio
de ilia montforig'
sciis kun emocio
la montojn



PENSEO

N-ro 184

Feb./2007

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 18-a jaro <http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm>

Mi Preferas Ordinaran Vivon

Wa Jiexi

Iam franca knabo petis manon de ĉina knabino.

Tio okazis ĉe la bordo de la Okcidenta Lago, kie rulis ondetoj glimaj. Tiun tagon, la suno disŝutis siajn varmajn kaj softajn radiojn sur la tero, kaj zefiro blovetis, skuante salikbranĉojn, hirtigante lian blondan hararon kaj levante la baskon de ŝia laktblanka jupo. Li fiksis, tra siaj pupiloj hele ĉielbluaj, sian atenteman rigardon al ŝiaj okuloj.

Kun unu genuo falanta sur la tero, li leĝere sed firme tenis la blankan manon.

"Edziniĝu al mi, ĉu bone?" Lia voĉo kun iom da ekzotika tono ŝvebis en la aero. Fakte, ŝi jam enamiĝis al li, sed kun kelkaj skrupuloj.

La longaj branĉoj de salikarbo svingadis en la vento. Tiumomente tempo kvazaŭ senmoviĝis por eterne.

Finfine, la knabino iome kapjesis. Kiam la knabo ekstaze brakumis ŝin en sian sinon, la knabino kvazaŭ demandis, "Ĉu vi amas min dumvive?"

Mi memoras ke la respondo estis jes.

Ĉio estis tre feliĉiga. Post geedziĝo, la knabino reiris kune kun la knabo al la franca bieno, kie kreskis sur vasta terspaco orecaj sunfloroj kaj hele purpuraj lavendoj forte allogaj al ŝi. Ĉiufoje kiam vento blovis, starante sur kampeĝo nudpiede kun etenditaj brakoj, ŝi sentis atakon post atako da ondoj de orkoloro kaj purpuro en la varma sunlumo. Ŝi estis sorĉita en tia sento.

Kun rideto, la knabo fikse rigardis ŝian dorsfiguron. Li silente konstruis purblankan

dometon — kiel blanka anĝelo — preĝante por ŝi.

En la domo plena je ama etoso estis ĉambro speciale preparita por la knabino — la ĉambro kiu enlasis sunlumon brili en ĝia ĉiu angulo. Ŝi ornamis la ĝisplankajn fenestrojn per purblankaj aĵuraj kovriloj, kiujn ŝi zorgeme elektis. En la mezo de la ĉambro metiĝis ronda vitra tableto kun blanka apogseĝo oblikve metita tuj apud ĝi, fronte al la senlima maro ekster la fenestro. Tia aranĝo estis pro tio, ke ŝi ŝatis ĵeti sian distran rigardon eksteren de tiu angulo kun siaj iom malfermitaj okuloj, kiam ŝi estis laca. Ĉe la muro staris malalta vico da libroŝrankoj, en kiuj estis libroj amataj de ŝi kiel sian vivon.

Memstara, ŝi ne bezonis lin vivteni ŝin. Ŝi povis verki, kaj karesemon kaj deikatan triston elspiris ŝiaj verkoj, kiuj kortuŝis legantojn. Post publikiĝo de ŝiaj verkoj en ŝia lando, ŝi neniam konsideris tion grava, kiel legantoj reagis al ili.

Ŝi nur serĉis tion, de kio ŝi povas dependi en la menso, kaj la veron kial ŝi pluvivos.

Tio jam sufiĉis.



Ĉiun frumatenon, kiam la unuaj sunradioj el la horizonto penetris en ŝian ĉambreton, ŝi, kiu ĉiam lasis sian longan brile nigran hararon nekombita, nudpiede eniris la ĉambron speciale preparitan de li al ŝi, en larĝa ;aktblanka piĵama jupo kaj kun taso da

densa kafo en la mano. Tie jam ŝin atendis ĉarma kaj freŝa rozo sur la vitra tablo, elsendante delikatan aromon.

Tie ŝi legis kaj verkis, atendante lian revenon. Tiun tason da densa kafo ŝi neniam trinkis, ĝuste kiel ŝi nur legis vortojn presitajn sur papero, sed obstine tajpis per portebla komputilo. Ŝi nur ŝatis la iom amaran guston de kafo. Kaj ŝi trinkis maldensan teon senescepte.

Tie ŝi legis kaj verkis, atendante lian revenon. Tiun tason da densa kafo ŝi neniam trinkis, ĝuste kiel ŝi nur legis vortojn presitajn sur papero, sed obstine tajpis per portebla komputilo. Ŝi nur ŝatis la iom amaran guston de kafo. Kaj ŝi trinkis maldensan teon senescepte.

Ili jam geedziĝis tri jarojn. En lia amo, ŝi sentis sin feliĉa, sed maltrankvila. Ŝi diris al li, "Kiam ni aĝos tridek jarojn, ni naskos infanon, ĉu bone? Mi volas, ke vi havas nur min en la koro antaŭ mia aĝo de tridek jaroj." Liaj okuloj estis ankoraŭ tiel bluaj kiel la ĉielo. Li ridete brakumis ŝin en sian sinon. "Estos tre danĝere, se vi naskos infanon je la aĝo de tridek jaroj." Ŝovante sian kapon sur la bruston de la knabo, ŝi diris, "Do, ni neniam havigos al ni infanon." El ŝia ŝajne arbitra voĉo spiris iom da sennoma kaj senhelpa tristo, kiu pikis lian koron. "Bone." Karesante ŝian longan brile nigran hararon, li ankoraŭ ridete diris, "Mi nur vin amas por ĉiam." En la okuloj estis iom da malespero, ĉar ŝi ne plu estis la knabino antaŭ tri jaroj, kiu nur ĉasis ion eternan, nun ŝi jam konsciiĝis iom post iom, kia pala esprimo estas "eterneco", kiam oni parolas pri la vorto.

"Se iutage vi ne plu amos min, do donu al mi infano, ĉu bone? Mi... ne volas...esti tiel sola... kiel solulino."

I.

Tempo povas konkeri ĉion. Finfine li perfidis ŝin kaj enamiĝis al alia virino. Li diris al la knabino, "Vere, mi petas vian pardonon."

Ŝi estis tre trankvila, tiel trankvila, ke ĉio ĉi ŝajne havas nenian rilaton kun ŝi. Ŝi nur diris senemocie, "Mi volas nenion krom ĉi tiun dometon. Se vi ne permesus, mi povus pagi kontraŭ ĝi. Krome, naskigu al mi infanon."

Li foriris, lasante la gravedan knabinon kaj la dometon blankan kiel anĝelon. Nur amo jam malaperis.

Ŝi venigis siajn gepatrojn por kune loĝi. Post dek monatoj, la infano naskiĝis. Ne gravis ĉu la infano estas vira kaj ina. Kiel kutime, kun taso da kafo, kiun ŝi neniel tuŝis, ŝi legis kaj verkis en tiu ĉambro plena je sunlumo ĉiumatene kaj, krome servis al gepatroj kaj vartis la infanon.

Laŭ ŝi, en la mondo, krom amo, estas fakte multaj specoj de sentoj, kiuj bezonas nian flegadon.

II.

La knabo eltenis la provon de tempo. Je la aĝo de tridek jaroj, ŝi naskis la unuan infanon dum lia vivo. Li fariĝis patro, kaj ŝi patrino.

Ŝi venigis siajn gepatrojn por kune loĝi. Vivante kun la junulo, ŝi servis al siaj gepatroj kaj vartis sian infanon ĉiutage. Kompreneble, ŝi, kiel kutime, iris al la sunlumplena ĉambro por legi kaj verki.

Ŝi diris al li, "Jam sufiĉas por mi vivi tiom da jaroj. Nun mia centro estas vi, mia infano kaj miaj gepatroj."

En la subiranta sunlumo, antaŭ la senlima orita maro staris ŝia dorsfiguro firmiĝinta tagon post tago.

elĉinigis **Samio**



Bonkoro (Gu Cunhua)

La Eta Maĝejo Vilaĝa

La eta maĝejo vilaĝa,
Kun povra aspekto grandaĝa.
L'mastrino plej milde ridadas,

Lokgusto aparta bongustas.

Sur muro la filmo en ekran',
Enfalas en valon l'aeroplan'--
Manĝiloj* jen haltas dumvoje,
Vinagras kaj salas plurfoje.

Subite la hundo ekbojas,
Sinjoro Manel** ja ekĝojas;
Li tuj senhezite rebatas,
La hundo nevole silentas.

Klientoj finpagis kunsate,
Biletojn kontrolas la mastrin',
En filmo ludadas sonate,
Servicon ja lavos la patrin'.

08. 12. 2006 en Chongqing



*=manghbastonetoj.

**Manel Vinyals:hispana verkisto, kiu kune kun sia amiko s-o Joaquim Marcoval en 2001 mondvojaĝante atingis nian urbon Chongqing kaj mi kaj s-o Zhao Dezhi amikiĝis kun ili. Dum ni vagis en la ĉirkaurbo Manel kun ĝojo imitis la bojadon de hundo.

Ĉineske

Daolianzi

unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el 5 versoj de
33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo x, a, a, x, a

Penso sub Neĝo

—Omaĝe al Espernto
sub neĝo
glacia
eltenas pens' defia
ju pli peza la premfort'
ĝi des pli energia

(Eto)

Sendormeco

En korto
de silent',
senĉese blovas frid-vent'.
Ne povas dormi dum nokt',
nur pro sonorila pent'?

(Zhuang Qixiong)

Moyuer


unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strof
ojpo 12 versoj de 346,76,3,37,4,545/36,6,76,
3,37,4,545 silaboj, laŭ rimaranĝo x,x,a,x,a,a,
x,a,a,x,x,a / x,a,a,x,a,a,x,a,a,x,x,a (x=senrim
a)

Cikonio kaj Konko

sur bordo
de l' rivero
je eko de juni'
konko sin malfermigas
por ĝu' de sunradi'
cikoni'
subite
alplonĝas kvaz' per ski'
por predpremi'
li volas beki
ŝian molon
spite al raci'



tujtuje
fermiĝas firme ŝi
tenas bekon de li
“se tiele vi mortos,”
li deklaras per kri'
“tragedi'
okazos”
ŝi respondis, “vi skabi'



PENSEO

N-ro 185

marto/2007

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 18-a jaro <http://www.elperno.net/penseo/penlisto.htm>

Ekzamena Intervidiĝo

Xiong Yanling

Aŭtobuso haltis ĉe stacio kaj pasaĝeroj eniris kaj eliris.

Ĉe la fronto de la aŭto sidis mezaĝa kampul-aspekta viro en malnova vesto, akre kontraste kun tiuj urbanaj pasaĝeroj en bonorda okcidentstila vesto. Li ne havis intencon eliri, kaj nur turnis sian rigardon al la aŭta pordo.

Subite ekbrilo aperis en liaj okuloj kaj li fiksas sian rigardon al tiu, kiu, kun aspekto de blankkoluma dungito, ĵus sidiĝis sur la sidlokon. Li, kun mira ĝojo, kriis al tiu, "Dingĉjo, Dingĉjo!" Surprizite, la blankkolumulo ĵetis straban rigardon kaj, kuntirinte siajn brovojn, donis nenian atenton al li. Ne turninte sian kapon, la kampulo ankoraŭ fiksas sian rigardon al li. Plilaŭtigante sian voĉon, li kriis al la blankkolumulo, "Dingĉjo, ĉu vi ne konas min?" Tiu ekrigardis lin strabe kun malpacieneco. Kiun vi vokas? Kiu estas Dingĉjo? Ĉu mi konas vin? La kampulo ne cedis kaj obstine fiksas sian rigardon sur lin, insiste kriante, "Mi vokas vin, Zhang Chuanding! Mi estas Zhuĉjo, Li Shouzhu! Ĉu vi ne konas min?" La vokito okule balais la ĉirkaŭrigardantojn kaj trovis, ke ĉiuj fiksas sian rigardon sur ilin. Li levis sian kapon kaj kontraŭdiris, "Diablo! Kiel mi povus koni vin! Rigardu, kiel vi aspektas!"

La kampulo, kiu neniel rezignis sen atingi sian celon, stariĝis el la sidloko kaj sidiĝis sur la vakan sidlokon apud la blankkolumulo. Li

fikse rigardis liajn okulojn, preskaŭ indigna. "Bone pririgardu min. Vi ne konas min, ĉu vere? Ni ambaŭ vivis kune de infaneco ĝis plenkreskuleco." La blankkolumulo mallevis sian kapon sen moveti sian palpebrojn. Li elbuŝigis, "Kial vi estas tiel enuiga? Vi misprenis min kiel vian konaton!" Post tio, li turnis sian kapon al la pejzaĝo ekster la fenestro, ekstreĉinte sian kravaton kaj platiginte sian sian bonorde kombitan hararon. Li movetis sian korpon flanken. La kampulo insiste daŭrigis, "Zhang Chuanding, mi aŭdis, ke vi havas bonan karieron. Ĉu vi povas doni bonan konsilon pri laborserĉo?" La blankkolumulo pretendis ne aŭdi lin kaj daŭre spekti la pejzaĝon ekster la fenestro. Forte skuante sian kapon, la kampulo eligis longan suspiron. Ĉiuj rigardoj en la buso pafiĝis sur lian vizaĝon, sed li trankvile reiris al sia sidloko.

La blankkolumulo elaŭtiĝis ĉe la pordo de granda kompanio. La kampulo sekvis lin. Ili ambaŭ eniris la pordon de la kompanio. Ĵetinte straban rigardon al li, la blankkolumulo eligis mokridon tra la nazo, "Vi babilema azeno, mi venas ĉi tien por peti oficon, ĉu ankaŭ vi?" La kampulo ŝanĝis sian antaŭan sintenon. Kun alte levita kapo kaj elstarigita brusto, li respondis nek humile nek arogante, "Mi ne venas por peti oficon." La blankkolumulo mokis, ridetante, "Vi venas ĉi tien por fariĝi servisto, ĉu ne?" La kampulo donis al li nenian atenton kaj faris rapidajn paŝojn antaŭen, lasante lin malantaŭe.

Dek kandidatoj venis por ekzamena intervidiĝo. La blankkolumulo sidis inter ili, atendente kun memkontenteco. Pensante pri

sia unuavica rekordo en la skriba ekzameno kaj sia eleganta aspekto, li sentis sin plena je memfida. Tiam alflugis voĉo ŝajne konata al li, "Zhang Ĉuanding!" Respondante altvoĉe, li tuj alkuris rapide al la intervidiĝejo. Apenaŭ li eniris la pordon, li surprizite eligis "aĥ" kun plene malfermita buŝo. Li pendigis sian piedon en aero kaj preskaŭ stumblis. Li ruĝiĝis kun hontemo, "Ĉu estas vi, ekzamenisto Li?" La ekzamenisto demandis, ridetante, "Ĉu vi rekonas min, do, post kiam mi ŝanĝas mian veston?" La demandito mallevis sian kapon kaj fikse rigardis siajn piedpintojn, ne sciante, kien meti siajn manojn. Lia antaŭa aroganteco kaj malvarmeco jam malaperis. Li klinis sian korpon kaj diris humile, "Ekzamenisto Li, konsideru pri nia kuna vivado de infaneco kaj ne pripensu mian kulpon. Bonvole..." La ekzamenisto, svingante sian manon, rompis lian parolon, "Mi tre taksas vian talenton, kaj mi devus doni al vi gravan oficon, sed vi ne trapasis la ekzamenan intervidiĝon en la buso..."

Blankkolumulo Zhang, malstreĉinte sian kravaton, staris ŝtoniĝante kiel ŝtupo.



elĉinigiĝis **Helo**

Ĉineske

Chaozhongcuo

unu el ĉinaj fiksoformaj poemoj el du strofoj de 4 kaj 5 versoj respektive de 7,5,66 / 444,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xxa,xa (x = senrima).

Lupo kaj Ŝafido

1.

al sama la rivero
pro soifpelo

lupo kaj ŝafido
trinkas en libero

ili staris
lup' pli supre
kun fiero
pli malsupre l' ŝafid'
en panik-sufero

2.

por regalo avida
je karn' ŝafida
lup' elpensis ruzon
de la plan' insida

li pretekston
plektis prete
"vi perfida
besto, kial akvo
mia klare-vida

3.

jen malpuriĝas de vi
per ŝlim' kaj defi'?"
"kiel, oh, mi povus?
fluo venas al mi

de la river-
supro via."
kun tima kri'
la ŝafid' respondis
kiel trema foli'

4.

preteksto venis nova
"per sakro-pova
lang' vi min insultis
en aŭtun' ventblova."

"mi ankoraŭ
ne naskiĝis
multemova
en la pufa ventro
de l' patrino kova"

5.

“diablon!” kriis lupo
 “vere sen dubo
 min insultis patro
 via per fek-rubo!”

senkulpulon
 li tuj kaptis
 sen ajn ludo
 ĝin formanĝis glute
 kun sia best-trupo



(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

(Komencantino)

Manjianghong

unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strof
 oj po 11 versoj de 434,344,77,353 kaj 33,
 33, 54, 77, 353 silaboj respective, laŭ
 rimaranĝo x,x,a,x,x,a,x,a,x,x,a/ xa,xa,xa,xa,x
 xa (x=senrima)

Spirito de Kamelo

ŝip' en dezert'
 vera kun
 fera volo
 obstine
 frekventadas
 sen ajn molo
 sub bako de arda sun'
 li kun fiera kolo
 paŝadas
 peze kun firma
 fervoro

soifo
 izolo

malsato
 rigoro
 eĉ ne ekzistas
 en laboro
 lia diligenta kaj
 fidela al popolo
 modelon
 li mem starigas
 en gloro

(eto)



Yijiangnan

unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el kvin
 versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo
 de xa,xa,a (x=senrima).


Kruela disiĝo

Printempo
 ankoraŭ frida
 vi diris, ke vi iros
 kun adiaŭ' perfida
 Ĵaluzo rida

Ĉu vere?
 vi ne diris foriri
 dum lasta amrenkonto
 vi hastas ja foriri?
 mi jam kaptiris.

Jam palas
 vizaĝo via
 Kapkline mi amsopiras
 vin kun amkoro pia
 jam tre ebria.

Matene
 mi vokis ne vin
 neniu diris al mi



PENSEO

N-ro 186

Aprilo/2007

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 18-a jaro <http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm>

Senvorta Devo

En ordinara postagmezo, li akiris ŝin pro neregebla impulso de gejunuloj.

Post kiam ŝi faligis multe da senvaloraj larmoj sur lian bruston, ŝi endormiĝis sur lia brako.

Ne viŝinte ŝiajn larmojn, li nur direktis sian rigardon al ŝia trankvila kaj kontenta mieno. Kvankam li sentis sian brakon sensenta, li ne kuraĝis eĉ moviĝi, tiel ke la bela kaj harmonia bildo daŭru pli longe.

Larmoj estas tre malvarmaj, li diris en la koro. Kaj li firme brakumis ŝin.

Post longe, ili ambaŭ vekiĝis brakumante unu la alian.

"Vi devas plenumi vian devon al mi," ŝi diris.

"Em, jes," li respondis.

Tiutage li ne banis sin kaj nur ŝanĝis sian kalsonon.

Post la unuafoja amludo, la amo inter ili nature pli varmiĝis kaj ili agis tute senbride.

Iutage, ŝi sentis vomemon. La ekzameno en hospitalo montris, ke li gravediĝas jam je tri monatoj.

Sciiginte pri tio, ŝi sentis timon kaj eĉ panikon, kaj ŝi stumble revenis hejmen. Ridetante, ŝi evitis la rigardon de la patro kaj eniris sian ĉambron.

En la ĉambro ŝi restis la tutan tagon. En la profunda nokto, ŝi telefonis al li, kiun ŝi jam ne kontaktis unu semajnon.

La telefono konektiĝis. Li respondis la telefonvokon, ankoraŭ kun dormemo.

"Kion fari? Mi jam gravediĝas," ŝi diris

subvoĉe.

Post momenta silento, li ŝajne ekstremis ĉe la alia fino de telefono.

"Ĉu eble?"

"Kion ni faru nun?"

Denove momenta silento.

"Ŝajne, ni povas...nur... abortigi ... ĝin," lia voĉo iom ŝanĝis.

"Sed mi ne havas monon."

"Mi donos al vi morgaŭ. Atendu min posttagmeze ĉe la lerneja pordo, kiam vi finos viajn lecionojn."

"Ĉu vi povos akompani min posttagmeze postmorgaŭ? Mi...timas..." ŝi elmetis la demandon al li post paŭzo.

Silentiĝis ĉe la alia fino de telefono. Ankaŭ regis silento ĉirkaŭ ŝi kaj en ŝia koro.

"Pardonon. Mi havos aferon morgaŭ," li malfacile diris tiujn vortojn kontraŭvole.

"Do, la tago post postmorgaŭ?" ŝi ne rezignis.

"Ankaŭ mi havos aferon, mi..."

Pa! Ŝi faligis aŭdilon. Ŝi ne volis aŭskulti lian klarigon. Ŝi longe ploradis sub litkovrilo.

La sekvan tagon, ili havis mallongan kaj malagrablan renkontiĝon. Preninte la monon el lia mano, ŝi sin turnis, kaj forkuris eĉ sen returni la kapon. Por pli ol dek sekundoj, ŝi ne eligis vorton.

Starante senmove, li faligis sian manon, per kiu li volus kapti ŝian manon. Li sentis korpikon, ĉar li vidis, ke la paro de ŝiaj grandaj kaj belaj okuloj jam fariĝis ruĝaj kaj ŝvelintaj, kaj li ankaŭ sentis kordoloron, ĉar li vidis kristalan brilon en ŝiaj okuloj -- ŝiaj larmoj.

La larmoj estas malvarmaj, li diris en la

koro. Kaj li postkuris ŝin.

Kiel fiŝeto, ŝi malaperis en homamaso, postlasinte ondetojn en lia koro.

Kaj poste, li ne plu sin turnis al ŝi, kaj ŝiaflanke, ŝi nature ne donis nenan viziton al li. De tiam ili ŝajne fariĝis fremduloj.

En palpebrumado, multe da tempo forpasis preter ŝi kaj li.

Kiel du jarojn antaŭe, ŝi restis sama, krom havigi al si novan amaton.

La amato montri sian komplezon, sed ŝi aspektis apatie. Estis vere malfacile por ŝi forgesi la epizodon okazintan antaŭ du jaroj, ĉar iom da doloro ankoraŭ restis en ŝia koro, la doloro, kiu eble estis akompanonta ŝin dumvive. Iun ordinaran dimanĉon, ŝi kaj ŝia amato, brako en brako, promenis ĉe kvietaj marbordo.

Ride interparolante, ili fintrinkis du botelojn da minerala akvo. Ŝi petis, ke ŝi iru forĵeti la malplenajn botelojn.

Kiam li alproksimiĝis al rubkesto kaj pretis ĵeti ilin en ĝin, subite alblovis konata voĉo el malantaŭ ŝia dorso.

"Ĉu vi povus doni al mi tiujn botelon, fraŭlino?"

Sin turninte, ŝi trovis neniun alian ol li.

Li sin vestis per malnova jako, kiun ŝi aĉetis por li, kaj per bovista pantalono blankiĝinta pro longa lavado, kaj en mano li prenis kelkajn travideblajn plastikajn sakojn plenajn je boteloj de minerala akvo. Li aspektis multe pli malgrasa ol du jarojn antaŭe, sed vigle.

Ankaŭ ekster lia atendo, la bela virino antaŭ li estis neniuj aliaj ol ŝi!

Senvorteco pro surprizo kaŭzis al ili videblan embarason.

"Ĉu vi fartas bone?" li ridetante demandis post iom da paŭzo.

"Em jes, kaj vi?"

"Pli malpli bone."

Senparoleco denove. Ŝajnas tiel, ke, kiam oni havas multon por diri aŭ por demandi, ili ne scias, de kie komenci.

"Ĉu vi...ne... volis lerni...en universitato? Kial, kial... vi fariĝis tia?" Ŝi apenaŭ eldiris tiujn vortojn.

"Por repagi ŝuldon," li respondis senrezerve.

"Repagi ŝuldon?" Ŝi iom surpriziĝis.

"Em jes, mi dungigis en fabriko. Dimanĉe mi venas ĉi tie por kolekti fatrasojn por vendi. Tuttage mi povas perlabori pli ol dudek yuanojn!" Li stulte ridetis.

Vidante lian memkontentan aspekton, ŝi sentis amarecon en la koro.

"Ĉu viaj gepatroj fartas bone?" ŝi demandis.

Malhela ombreto fulmis en liaj okuloj, kaj li mallevis la kapon. Ŝi tuj konsciis, ke ŝi faris kelkajn demandojn al li, kiujn ŝi ne devis fari.

"Tiu tagon, kiam mi foriris de vi, mia patro forlasis la mondon kaj mia patrino malsaniĝis kaj neniam resaniĝis. Tiufoje, mi ne akompanis vin, ĉar mia patro nelonge enhospitaliĝis kaj neniu zorgis pri li... Por repagi la ŝuldon de kuraca kosto kaj helpi mian fraton daŭre lerni, mi devis dungigi kelkloke," li diris, mordetante siajn lipojn.

Ŝi stuporiĝis, ĉar ŝi ne havis sufiĉan tempon por pensi pri liaj ŝajne simplaj sed konfuzitaj vortoj.

"Hej, mi volas doni al vi aĵon," li diris abrupte.

Demetinte kion li havas en la mano, li deprenis de ĉirkaŭ sia kolo kolĉenon kun boteleto pendanta.

"Tio ĉi... estas..." Ŝi ĝin akceptis.

"En ĝi troviĝas miaj larmoj... kaj viaj larmoj, kiuj tiam falis sur mia korpo. Ĉiam estas mia kulpo. Par...donon... Mi ne plenumis mian devon, kiam en troviĝis en plej granda sufero. Mi ne akompanis vin... Nun mi redonas al vi larmojn. Mi ne rajtas posedi ilin," li diris plorsingulte.

Ŝiaj okuloj nebuliĝis. La larmoj ne sukcesis restadi en ŝiaj okuloj.

"Nenio okazas al vi, ĉu?" kriis ŝia amato de

malproksime.

Ŝi ne respondis.

"Mi, mi devas foriri. Ĝis!" li diris hasteme.

Ŝi vidis, ke li levas el la tero plastikajn sakojn kaj malaperas ĉe la stratangulo kun sia soleca dorsfiguro. Ŝi volus voĉe haltigi lin, sed ŝi ne povis eligi sonon.

"Kio okazas al vi?" Ŝia amato alproksimiĝis.

"Nenio," ŝi respondis.

"Kial vi esploras? demandis ŝia amato.

"Mi ploras, kiam ajn mi volas," ŝi sin sentis faciligita.

"Em..." Li troviĝis en nebulo.

"Ne pripensu multe. Nenio okazis al mi. Neniam vi povas legi virinon," ŝi ridete diris, forviŝinte larmojn.

Ĉe tio, ŝi prenis lian brakon kaj antaŭen kuris, trenante lin.

"Hej, hej, kio ekscitas vin ĝis tia grado?" li kriis.

"Tio ne koncernas vin. Ho, poste vi devos plenumi vian devon pri mi!" ŝi diris kun feliĉa rideto.

"Em..."



elĉinigis **Samio**

Antikvaj Poemoj

Du Mu (803-852)

En Aŭtuna Nokto

ekranon aŭtun-nokt' fridigas en kandela lum'
svingiĝas peli kulojn gaza ventumil' en zum'
La ŝtupoj malvarmiĝas akve en vualo nokta
ŝi kuŝe spektas la stelparon* jen en amindum'
* "stelparo" ĉi tie aludas bovistan kaj teksistan
stelojn, kiuj, laŭ ĉina antikva legendo, estas du

amantaj steloj.

Li Bai (701-762)

Ekirante de Baidi-Urbo ĉe

Matenkrepusko

Ekirante de la urb' kun nub' viola,
mi mil liojn velis nur en tago sola.
En senĉesaj tristaj blekoj de simioj
pasis dekmil montojn jam boato fola

Dediĉe al Wang Lun

Mi en boato volas tuj ekiri,
min kantovoĉ' elborda faras miri.
La Persik-Lago ja ne pli profundas
ol via sento por adiaŭ diri.

Tradukis **Vejdo**

Ĉineske

Eto


Eterna Majstro

memore pri forpaso de Zamenhof je
naŭdek jaroj

— laŭ ĉinesko Manjianghong

**ni silente
staras por
karmemora
Zamenhof
kreinto de
lingvo glora
en nia vizio li
verkas en pen' labora
asidue
por nia lingvo
honora**

**li staras
varmkora
sur podi'**



PENSEO

N-ro 187

Majo/2007

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 18-a jaro <http://www.elperno.net/penseo/penlisto.htm>

Eto

Majtago

—laŭ ĉinesko Chaitoufeng*

maja tag'
laborflag'
zamenhof vokas al ag'
persone
sindone
al esperant'
kvazaŭ ŝtone
he, he, he

maja tag'
sen ajn blag'
marŝu al celo sen vag'
varmkora
fervora
ĝis sukceso
plenkolora
ha, ha, ha

**Chaitoufeng*: unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj, konsista el du strofoj po ok versoj de 3,3,7; 3,3,44,3 silaboj, laŭ rimaranĝo de aaa;bbxbb kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj (x=senrima).


Anasoj

Printempe de lasta jaro, mia 12-jara filo vundis sian kruron pro stumblofalo. Aŭdinte tion, mia patrino, kiu loĝas en la kamparo, alvenis por viziti sian trezoran nepon, kun du anasoj en mano, post 20-kilometra piedirado laŭ malebena montvojo.

Post ŝia foriro, mi diris al mia edzino, "Mortigu la anasojn!" Ŝi montris heziton. Mi sciis, ke ŝi ne volantas tion fari. Kaj mi venigis Majstron Zhang en manĝejo kaj diris, "Majstro Zhang, forportu ĉi tiuj du anasojn por breĉi. Eble ili ellasos ovojn." Maljuna Zhang jesis, "Kiel grasaj anasoj!"

Unu tagon ĉe la fino de la monato, li frapis sur mia pordo. Li kunportis korbon kovritan per blanka lavtuko. Mi naskis nekomprenon, dirante, "Majstro Zhang, vi..." Levinte la lavtukon, li diris, "Direktoro Liu, post kiam mi forportis viajn anasojn, mi manĝigis ilin per kelka manĝestaĵo. La duan tagon ili eĉ komencis ellasi ovojn!" Mia edzino kaptigis de ĝojo, "Ĉu jes?" Li respektplene respondis, "Kial ne! Kalkulu, tie ĉi estas 60 pecoj!" Poste, ĉe la fino de ĉiu monato, ni ricevis po 60 ovojn senditajn de Maljuna Zhang ĝustatempe.

La deka de la dekdua monato laŭ ĉina kalendaro estis la naskiĝtago de mia patrino. Miaj edzino, filo kaj mi hejmeniris por celebri la tagon per granda korbo plena je grandaj anasovoj. Kun granda ĝojo, mia patrino diris, "Jam sufiĉas por vi tri veni por celebri la tagon. Kial vi aĉetis anasovojn?" Mia edzino diris, "Panjo, tiuj anasovoj estas ellasitaj de la anasoj, kiujn vi kunportis al ni lastfoje." Ridetante, la patrino diris, "Ne trompu min. La anasoj, kiujn mi donis al vi, estas viraj!"



Tradukis **Liangmin**

Antikvaj Poemoj

Bai Juyi (772-846)

AĈETI FLOROJN

Printempo en ĉefurbo baldaŭ velkos.
Bruas kaleŝoj sur stratoj veture.
Nun en disflora temp' de peonio,
oni aĉetas la florojn konkure.

Ĉu kara aŭ mal, la prezo ne fiksas.
Decidas nombr' de floroj aĉetata.
Cento da ruĝaj peoniaj pecoj
kostas rulojn da silkaĵ' delikata.

Por ŝirmi tendoj estis starigitaj,
kaj heĝoj por protekti al la floro.
Bedi per humo kaj verŝi per akvo.
Post transplantad' senŝanĝas la koloro.

Por popolanoj tio iĝis moro.
En flormanio ĉiuj dronis arde.
Okaze olda avo kamparano
venis al flora foiro hazarde.

Longe li veis kapkline suspire.
Neniu konis pri liaj konscioj.
Bukedo da skarlataj peonioj —
imposto de dek mezriĉ-familioj.



Tradukis **Guozhu**

AROGANTAJ EŬUKOJ

Tuta strato plenas de aroganteco.
Sur ĉevaloj brilas luksa selsurfaco.

Softe mi demandis: Kiuj ili estas?
Oni diris: Jen eŭnukoj el palaco.

Ruĝa kvasto montras rangon de ministro
kaj purpura insignas pri generaloj.
Por ĉeesti al la armea bankedo,
trotagalopas nube iliaj ĉevaloj.

En pokaloj verŝiĝas nektara vino,
amasiĝas kaj frandaĵoj montaj, maraj,
kiaj oranĝoj el Dongting delikataj,
kaj el Tianci dishakitaj fiŝoj raraj.

Post satmanĝo ili dronis en delico,
ankaŭ plivigliis ebria animstato.
Sed sudlande jam okazis trosekeco,
ke homoj eĉ manĝas homojn pro malsato.



Tradukis **Guozhu**

AMSOPIRO

Dum mi sunumas objektojn en korto,
ekvidis ŝuojn hejmlokajn en paro.
Kiu donacis ilin al mi ame?
Knabino de orienta najbaro.

Mi karmemoras pri ŝia parolo.
Aludi per la ŝuoj pri espero
ke ni simile al tiu ŝuparo
ĉiam kunestu ambaŭ en sincero.

Kiam mi venas ekzile al Jiangzhou
post trimil lioj da longa vojaĝo,
memore al la kara donacinto,
kunportas mi la ŝuojn sen damaĝo.

Hodiaŭ kun profunda sentimento
rigardas mi foj-foje emocia.
Ŝuoj en par', sed homoj en disiĝo,
sortoj malsamas unu de alia.

Kiel domaĝe, ho kiel veinde!
Jam distordiĝis ŝuoj kun dekoru.
Post longa fuŝo far pluva sezono,
formortis floroj kaj palis koloro.



Tradukis **Guozhu**

Liu Yuxi (772-842)

Ĉe Ŝtona Urbo

Prezentas bildon la aŭtun' de inerci'
sed super primavero belas ĝi, laŭ mi.
Al blu' ĉiela vasta gru' sin pafas jam,
inspiro mia soras kune jen kun ĝi.



Tradukis **Vejdo**

Ondo Lavas Sablon

Sinue fluas Flava la Rivero*,
ondanta tange foren sub ventpelo,
kvazaŭ kaskadus ĝi al ĉielvolbo,
kie l' feino vivas de fabelo.

* la dua plej granda rivero en Ĉinio.

Tradukis **Vejdo**

Wang Bo (649 aŭ 650 — 675 aŭ 676)

En Monto

Malfluas Jangzi* jen en trista preno,
Sopiras fore mi al hejmvreveno.
Aŭtuna vento nun sursure blovas,
Folioj flavaj flirtas sur montĉeno.

*Jangzi-rivero estas la plej granda rivero en Ĉinio.

Tradukis **Vejdo**

Ĉineske

Niuniu

Granda Amo

Okaze de Patrino Tago 2007
—laŭ ĉinesko Shuidiaogetou*

dum multaj jaroj
suferojn dekmil
vi karega spertis
sed kun kor-trankvil'
ĉiam vi forridis
la malagrabraĵojn
en ĝoja babil'
kaj min edifas
per bona konsil'



amema
sindona
kun humil'
al via edz'
kaj esperoplena fil'
por hejma bonstato
kaj ilia onto
la ama profil'
eterne

	<h1>PENSEO</h1>	<p><i>N-ro 188</i></p> <p><i>Junio/2007</i></p>
<p>Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994</p>		
<p>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 18-a jaro http://www.elperno.net/penseo/penlisto.htm</p>		

Eto

Knabeco

—laŭ ĉinesko Yijiangnan*
Okaze de Infana Tago

knabeco
la suno ora
prilumas mian koron
kristalan kun favora
la lumo glora

knabeco
ondanta maro
alportas al mi larmojn
pri pasintaj koŝmaro
kaj petol-faro

knabeco
floro aroma
beligas l' ordinaran
vivon kun ĝojo doma
kaj simpla noma

knabeco
numero blanka
jen min al firmamento
profunda kaj blu-planka
ĉagren-senmanka

knabeco
gajplena roĵo
forfluis malproksimen
kun mia plend-malĝojo
fojon post fojo

* Unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo de xa,xa,a (x=senrima).

Antikvaj Poemoj

Bai Juyi (772-846)

Persikfloroj en Dalin-templo

April' floradon finis jam en la homa mondo,
sed temple persikfloroj ekpompas sur la
monto.

Bedaŭris mi sen-scie: Kien nun la printempo?
Ĉi tien! ekster mia atendo jen respondo.

Tradukis **Guozhu**

Han Yu (768-824)

Fazan' Trafita Sage

En kvieto kampa brulis la ĉasfajr' invade,
fuĝe ĵetis sin fazan' sub agla ĉas-minaco.
Por elmontri la ĉas-lerton militĉef' parade,
forte streĉis arkon ŝajn-atende kun sagaco.
Plimallarĝis preme la sieĝ' de homamaso,
pro surpriz' fazan' elflugis kaj trafita sage.
Ĝi barakte puŝis sin en homojn sen forlaso,
falas teren kun plumar' sangmakulita svage.
Militĉef' ridegis en ĉirkaŭa huraado
pri ĉasaĵo kolora ĉe ĉevalĉara rado.

Tradukis **Vejdo**

Wang Jian (847-918)

Kanzoneto pri Ŝiphaŭlisto

Ve, kiel ŝiphaŭlisto servas mi mizere,
por reĝo trenas ŝipojn ŝvite sur haŭlvojo.
mi tage klopodadas kun malmulta ĝojo,
tranoktas surboate akvbird-maniere.

Mi kontraŭflue penas kun streĉita forto,
ne vidas kie estas la staci' celita.
Noktmeze en vetero pluve neĝ-agita
ordono pelas min al servo kun kohorto.
Kun vest' malseka nokta-froste ĝis la haŭto
kaj pikdolor' neeltenebla je kalkano
ne povas ni elverŝi plendojn al tirano,
laŭpaŝe ĉantas la koleron nur en laŭto.
Mi ne domaĝas mian senvaloran ĥaton
sed ĉiam mi sopiras al gepatra lando.
Mi volas, ke riveroj iĝu kampa granda
ke ni haŭlistoj ne plu priplendu malŝaton.

Tradukis **Vejdo**

Edz-sopira Roko

Starante sur verdeta monto,
vizaĝe al rivera ondo,
la rok' obstinas por eterne,
vidante lin en vagabondo.
Tra pluv' kaj vento nokte-tage,
ĝi pretas diri ĉe renkonto.

Tradukis **Vejdo**

Vilaĝo en Pluvo

En pluv' aŭdiĝas kokerik' ĉe ĥatoj je foj-fojo,
tra bambutufoj sub pontet' oblikva fluas rojo.
Por silkraŭpid' prizorg' virinoj voke sin
invitas,
en kort' nur gardenioj staras kun senfara ĝojo.

Tradukis **Vejdo**

Ĉineske

Vejdo

Rememoro pri Knabeco

—laŭ ĉinesko Manjianghong*

Omaĝe al Infana Tago 2007

tagoj jaroj
forpasis

rememoro
nur svaga
restas ene.
juna koro
ne konis kaj ĉagrenon
kaj ĝenon. Nur fervoro
por ludo
por petolado
ignoro

al lac' kaj
doloro
fariĝis
motoro
kreiva nuna
nokta horo
adventurplena formis
min spitant' al hororo
plej gravis
sencia mia
esploro

* unu el ĉinaj fikformaj poemoj el du strofoj po 11 versoj de 434,344,77,353 kaj 33,33,54,77,353 silaboj respective, laŭ rimaranĝo x,x,a,x,x,a,x,a,x,x,a/x,a,x,a,x,a,x,a,x,x,a (x=senrima)

Lily

Knabino de Sol-Patrina

—laŭ ĉinesko Guizhixiang*

panj' kruela
enŝlosas min en
spaco ĉela
for de amiko
la miela
ĉu mi severe kulpas
en faro
tagohela
varma kiso
brakumado
ĝu' ĉiela

nur ludo bagatela

mi sentas iom
 min amcela
 tamen vi persvadis
 neribela
 ĉu mi nun povus montri
 min tiom
 nefidela
 ĉio estas
 nur burĝono
 ama bela

* unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj po 11 versoj de 4,54,64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,x,a,x,a,x,x,a,x,x,a (x=senrima)

kaj raci'
 frontas foj-refoje
 sen ajn emoci'
 al disiĝoj
 de sent-apati'
 daŭre vin serĉadas
 kun rideto
 neeble
 aperu mi

* unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj po 9 versoj de 335,45,6434 / 3,65,45,6434 silaboj respective, laŭ rimaranĝo xxa,xa,xxxa / a,xa,xa,xxxa (x= senrima)

Xi Murong

Elegi' al Vivo

—laŭ ĉinesko Qinpingyue*

dumvive mi
 ne kun emoci'
 vin plu vidas, ĉar la
 renkontot' ne estas vi

ne aperu vi plu
 en mia memorĝu'
 sed tiuj ŝanĝiĝoj
 vivaj kaj tempflu'

* unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj po 4 versoj de 4,5,7,7,6,6,66, laŭ rimaranĝo a,a,a,a,b,b,xb (x = senrima)

Kial?

—laŭ ĉinesko Shanhuazi*

la plumon ŝlosi plene
 mi povas. kial ene
 ĉagrenon, amon povas
 mi pene

ne povas? kial ĝojo
 efemeris fal-svene
 kaj bona temp' foriras
 senĝene

* unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj po 4 versoj de 7,7,73 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,xa (x=senrima)

Ekkompren'en Pluvo

—laŭ ĉinesko Zhuyingtaijin

se pluvon
 re pluvo
 sekvas en seri'
 se ĉagreno
 ripetas jen pli
 sen ĉes' sen lim' sen fin'
 mi volonte
 aplombe
 kun ekkonsci'

Hejmveo

—laŭ ĉinesko Yexingchuan*

hejmlanda mia kanto —
 jen fluto
 de ŝveb-lanto
 ĉiam ludas
 en lun-nokto
 vizi' de hejmlando

verŝajne svagas hanto
nebula
en konstanto
adiaŭa
hejmve' — ĉiam
juniĝa arb-planto

* unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj po 6 versoj de 7,34,446 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)

tradukis Sam



Komencantino

Azena Ruzo

—laŭ ĉinesko Wanghaichao*

1.

Salon portis
laŭ rivero
pene la azeno.
Pro peza ŝarĝ'
ĝi enfalis
stumble kun ŝarĝpleno
akven kun ĝeno.
Kiam ĝi rampis
al tereno
seka borda,
eksenton de depreno

je peza ŝarĝteno
ĝi havis (ĉar sal'
je akv-veno
tuj solviĝis).
Do, de tiam,
en porta promeno,
kun granda peno
ĝi ĉiam saltis
sen ajn spleno
en riveron
por malpli peza premo.

2.

Alifoje
ne la salon
ĝi sammaniere
transportadis
sed la spongon.
Marŝis vol-libere
ĝi jen surtere
laŭ riverbordo.
Ĝi mizere
sub pezŝarĝo
iradis netolere.

Do, ĝi tuj prefere
en akvon saltis
sendanĝere
por malpli
da ŝarĝpezo.
Spong' ja sorbis vere
akvon senpere.
Ho ve la pezo
malleĝere
prekaŭ premis
ĝin ĝisteren severe.

* unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj po 14 versoj de 446,446,5,54,47 / 6,54,446,5,54,47 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,a,xa,xa / a,xa,xxa,a,xa,xa (x = senrima)

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)



◇
Eldonas Redakcio de *Penseo*
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: Fremdlingva Fakultato, Nanhai
Kolegio de Sud-Ĉina Normala Universitato,
Nanhai, Guangdong 528000, Ĉinio
Tel: (0757) 86366253 (hejme)
E-poŝto: vejdo@163.com
Ĉiujn kontribuarojn al la ĉefredaktoro.
Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin
turnu al www.elperno.cn/penlisto.htm
◇ ◇

	<h1>PENSEO</h1>	<p><i>N-ro 189</i></p> <p><i>Julio/2007</i></p>
<p>Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994</p>		
<p>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 18-a jaro http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm</p>		

Recenzo

DIVERSKAŬZE ĜOJINDA

—Post lego de eLibro <300 Sopir-al-Sudoj>

Guozhu

En 2007-07-07, tago memorinda, mi legis ĉineskan eLibron «300 Sopir-al-Sudoj». Tiu nova eLibro donis al mi grandan ĝojon, kaj despie, la motivoj de ĝojigo montriĝas eĉ pluraj.



(e-librigita de Elerno, p. 90, pdf. Jul.2007)

1.<Sopir-al-Sudo> estas unue la ĉina fikforma poemo plej populara kaj ofte uzata. La fama poemtrio versita de Bai Juyi(772-846) laŭ tiu ĉi skemo, por multaj ĉinoj ja estas ĝisparkere famkonata. Fakte, tiu ĉi skemo aperis ja pli frue antaŭ ol Bai Juyi versis "Kial ne sopir' al sudo?". Ĝi vivdaŭris do almenaŭ pli ol mil jarojn. En la longa tempo de jarmilo, ĉu en Ĉinio oni iam eldonis (en la ĉina) poemaron «300 Sopir-al-Sudoj»? Verŝajne neniam. Tial, tiu ĉi esperanta eldono de «300 Sopir-al-Sudoj», kreita de ĉinaj esp-istoj, estas vere senprecedenca en Ĉinio.

2. Tiu ĉi eLibro kolektis 314 ĉineskojn <Sopir-al-Sudo> de 10 aŭxtoroj (Ardo, Eto,

Guozhu, Komencantino, Lily, Mao Zifu, Miĉino, Niuniu, Sam, Zhuang Qixiong), kies krea tempo amplektas ĝuste tiun de eniro de ĉinesko en Esperanton (ekde 1973 ĝis nun), tial kun aparta memorindeco.

3. Kvankam multaj ĉinaj poetoj dum jarmilo versis sennombrajn <Sopir-al-Sudo>jn, tamen, rigardu en diversajn poemarojn, ĉu estis iu, kiu versis rakonton unufoje per dekoj aŭ centoj da <Sopir-al-Sudo>j? Ho, verŝajne ankoraŭ neniu en malnova tempo. Tial, ke nia poetino Lily per 30 <Sopir-al-Sudo>j pri "Rememoro pri Seksatenciteco" kaj Komencantino per 177 <Sopir-al-Sudo>j pri "Ezopo", ambaŭ estis senprecedencaj rekordoj de tiu ĉi skemo.

4. Versi <Sopir-al-Sudo>n en la ĉina aŭ en Esperanto, estas kun tute ne sama signifo. Pro mia malerudicio, mi, Guozhu, ankoraŭ ne scias ĉu ekzistas alia(j) fremda(j) lingvo(j) kiu(j) ankaŭ povas servi por versi laŭ rigoraj skemoj de ĉina fikforma poezio? Mi nek scias ĉu ekzistas alia(j) artfarita(j) lingvo(j) kiu(j) ankaŭ povas servi por versi laŭ rigoraj skemoj de ĉina fikforma poezio? Tamen, la lingvo Esperanto, adore amata de ni, ja sukcesis! Tio konvinke montris la mirindan flekseblecon, maturecon kaj esprimivon de Esperanton.

5. <Sopir-al-Sudo> estis la unua ĉina fikforma poemo enkondukita en Esperanton. Antaŭ ol ĝia eniro en Esperanton, jam okazis multaj precedencoj el pluraj landoj ĉu de la okcidenta aŭ orienta poezio. Ni rimarkis ekz-e la multjaran furoron de japanesko, kiu, laŭ Waringhien, funkciis kvazaŭ kiel prezentanto de la orienta poezio. Nu, ni scias, ke la 92-a

UK okazos post monato en Japanio, kaj, profitante la ŝancon de UK, japanaj s-anoj lanĉis Utafeston, varbante mondiskalan partoprenon per japaneskoj. Tre eble esp-istoj tra la mondo verŝajne nun scias nur japaneskon sed neniom pri ĉinesko. Tial, la apero de la eLibro «300 Sopir-al-Sudoj » en tiu momento, sur tia fono, montras al la publiko kolorriĉan belon de ĉina fiksforma poezio, kaj, miaopinie, ankaŭ bona kuraĝigo al ĉiuj ĉinaj esp-istoj, kiuj ekveturos al la 92-a UK.

6. Por neĉinaj esp-istoj, tiu ĉi eLibro «300 Sopir-al-Sudoj » servas kaj kiel aprecinda poemaro, kaj kiel bona gvidlibro al ĉinesko. Poeziamantoj, kiuj jam konis la japaneskan tankaon, facile trovas la grandan similecon inter la tankao kaj la ĉinesko <Sopir-al-Sudo>. Ĉar nombroj de ĉineskoj superis 2000, tial por neĉinaj legantoj lerni ĉineskon estas vere malfacila tasko. Tamen, laŭ proverbo pri ĉina sperto en lerno de poezio: "Legu la 300 Tang-poemojn ĝis parkere, sensperta vi ankaŭ povos versi klere." (Ni ŝanĝu unu vorton kaj "Legu la 300 Sopir-al-Sudonjn ĝis parkere, sensperta vi ankaŭ povos versi klere.") Tiu ĉi eLibro liveras al vi facile imitindajn modelojn.

7. «300 Sopir-al-Sudoj » estas kompilita de eLerno kies akvmarko nun aperas ĉiupaĝe. Sed ĝi ne estas la unua nek la unika ĉineska eLibro. Antaŭ ĝi jam aperis 5 <Ĉineske>libroj kun ĉ. 1000 ĉineskoj, pli frue aperis ankaŭ la ĉineska eldono de <Ezopa Saĝo> de Vejdo (kun Antaŭparolo de Guozhu, 522 ĉineskoj en 55 skemoj). Ni kredas ke la nuna «300 Sopir-al-Sudoj » estas nur unu el la aperintaj kaj aperontaj eLibroj de Ĉineska Biblioteko de eLerno.

8. Antaŭ jardekoj, en sia organo revuo Esperanto (n-ro 2, 1979), UEA per la tuta paĝo de la unua kovrilo publikigis fotojn de ĉina EM kaj hurais per la entuziasma slogano "Ĉinoj (re)venas!". Ĉijare, Guozhu jam dufoje prelegis pri ĉinesko (maje en la 12-a Hubei-a

Esperanto-Seminario, kaj junio en la 2-a Nordokcident-Ĉina Kongreso de Esperanto), kun titolo "Ĉineskoj Venas!" Sed tio ankaŭ ne estas fino. Ni kredas, ke post la apero de «300 Sopir-al-Sudoj » sekvos ankoraŭ novaj fruktoj el ĉina Esperantujo.

Aĉetado de Legomoj

Inter miaj hejmo kaj laborejo estas iom longa distanco, kiu bezonas ĉirkaŭ unu horon de biciklado. Ĉiufoje, kiam mi iras al kaj el laboro, mi trapasas bazaron, kie oni vendas legomojn sur standoj laŭ ambaŭ flankoj de la vojo. La plejparto de la legom-vendantoj estas kamparanoj el ĉirkaŭa kamparo. La legomoj, kiujn ili vendas, estas plantitaj de ili mem, kaj, ĝenerale, estas pli freŝaj kaj malmultekostaj ol tiuj en legombutikoj en urbcentro. Kiam mi trapasas tiun bazaron post mia laboro, mi ĉiam debicikliĝas kaj pririgardas laŭvoje. Je vido de legomoj, kiuj taŭgas laŭ mia deziro, mi aĉetas iom.

Iun vesperon de lastjara somero, Kiam mi alproksimiĝis al la fino de la bazaro, mi vidis du infanojn kaŭri inter homamaso, kiuj evidente estis gefratoj, unu el ili 11-12-jara knabino, kaj alia 7-8-jara knabo. Antaŭ ili metiĝis bambua korbeto, kiu entenis 1-2 kilogramojn da verdaj paprikoj. La ŝvitaj makuloj sur iliaj vizĝoj kaj korpoj sin montris, ke ili jam restis tie longan tempon.

Kiam la knabino vidis min, ŝi timplene demandis, "Ĉu vi volas aĉeti iom, franjo?" Post tio, ŝi mallevis sian kapon.

"Kiom kostas unu kilogramo?"

"Du yuan-oj," ŝi respondis, ne kuraĝante levi sian kapon.

"Estas multekoste. Pro longa sunumado, tiuj paprikoj jam ne estas freŝaj."

"Do, 80 centimoj."

Mi ekridetis, "Ĉu vi faras vendadon la unuan fojon?"

"Jes. Panjo diris, ke la lerneja kotizo estos pagita per la mono el legom-vendado," respondis ŝi mallaŭte kun mallevita kapo.

"Ankaŭ mi. Mi baldaŭ komencos viziti lernejon," diris laŭte kaj fiere la knabo, forviŝante la ŝviterojn de sur la vizaĝo.

"Kiel saĝa knabo! Mi aĉetu la tuton da paprikoj."

La knabo tuj hurae eksaltis, "Franjo, ni povas rehejmeniri!"

La sekvan tagon, mi refoje vidis la gefratojn en la sama tempo ĉe la sama loko. La knabino ankoraŭ timplene demandis, "Ĉu vi ankoraŭ aĉetos iom?"

Ridetante, mi diris, "Jes. Vi povas rehejmeniri."

Iom post iom aĉeti iliajn legomojn fariĝis mia tasko, kiun mi devis plenumi ĉiutage. Okaze, kiam mi ne vidis ilin, mi ĉiam ĉirkaŭrigardis por serĉi ilin en la homamaso, kaj post kiam mi certigis min, ke ili forestas, mi revenis hejmen.

La legoma korbo iom post iom fariĝis pli granda kaj entenis pli da legomspecoj. Ĉiufoje mi aĉetis kiel eble pli multe, kaj plejofte eĉ la tuton da iliaj legomoj. Rezultis, ke mia familianoj plendis kontraŭ mi plurajn fojojn pri tio, sed mi sentis min ĝoja fari tian aĉeton.

Ĉirkaŭ la fino de aŭgusto, mi forveturis aliloken pro laboro kaj, kiam mi revenis, jam estis la mezo de septembro. Tiutage, kiam mi trapasis la legom-bazaro, mi mire trovis, ke la knabino sin lokas en la sama loko, kaj krie ofertis legomojn en du grandaj korboj antaŭ ŝi. Vidinte min, ŝi laŭte salutis, "Franjo, jen vi revenas!"

Mi demandis al ŝi, "Kial vi forestas de lernejo? Ĉu hodiaŭ estas ripoztago?"

"Mi jam ĉesis lernadon, ĉar panjo diris, ke la mono akirita de universitata studento estas malpli multa ol tiu de vendisto.

Mi stuporiĝis...

elĉinigis Liangmin

Ĉineske

Sam

Stilo de Batalanto

—laŭ ĉinesko Busuanzi*

funebre pri s-ro Gu Cunhua

vi, batalanto

firma, sindona

por nia Esperanto

homar-bezona

senlace semas

plugas sensona

kaj obstine persistas

per forto sprona

**Busuanzi: unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj same el 4 versoj de 5,5; 7,5 silaboj kun duona rimo*



Lily

Funebre pri s-ro Gu Cunhua

—laŭ ĉinesko Shiliuziling*

ve

batalis por nobla ide'

vi kara

falis en pere'


je

tutvivo por verda kre'

vi ĉiam

penis streĉe tre

he



PENSEO

N-ro 190

Aŭg. / 2007

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 18-a jaro <http://www.elperno.net/penseo/penlisto.htm>

Vejdo

Julio Brila

Okaze de 120-jara Naskiĝo de Esperanto

—laŭ ĉinesko Manjianghong

sunsezona
 julio
 kalendara
 helbrila
 kaj samtempe
 memor-kara
 l' Internacia Lingvo
 estas cent-dudek-jara
 kun forto
 de vivdaŭrigo
 senpara

ne haltu
 senfara
 al celo
 lumklara
 laŭ voj' zigzaga
 obstaklara
 marŝu, samideanoj,
 strebu, kun pen' prepara
 por mondo
 trans lingva baro
 amara

DU AMIKOJ

Guy de Maupassant

Parizo estis sieĝita, malsatinta kaj ĝeminta. La surtegmentaj paseroj fariĝis tre raraj. La ratoj en la kloako estis ne troveblaj plu. Oni manĝis kion ajn ili trovis.

S-ro Morissot profesiis kiel horloĝisto kaj okaze militservis en la nacia armeo de sindefendo. En serena mateno de januaro,

ĝuste kiam li triste laŭ ekstera bulvardo estis promenanta, kun malplena ventro, kaj kun du manoj en pantalonpoŝoj de uniformo, li subite ĉesis siajn paŝojn antaŭ k-do, kiun li rekonis kiel amikon. Jen estis S-ro Sauvage, konato konatiĝinta ĉe la bordo de rivero.

Ĉiudimanĉe, antaŭ la milito, Morissot frumatene eliris, preninte fiŝkanon el bambuo per la mano kaj preninte surdorse skatolon el blanka fero. Li veturis al Argenteuil en vagonaro kaj elvagonariĝis je la stacidomo Colombes, poste li piediris al la insulo Marante. Li komencis hokfiŝi, tuj post alveno al ĉi tiu loko de sia revo. Li hokfiŝis ĝis vesperiĝo.

Ĉiudimanĉe, li ĉiam tie renkontis dikan kaj gajan malgrandulon, S-ro Sauvage. Li estis merceristo sur la strato Nia Damo de Lorette, ankaŭ li estis fanatika fiŝhokulo. Kaptinte fiŝkanon per sia mano, kun du piedoj pendinte malsupren en la fluo, ili ofte pasis duontagon ŝultro ĉe ŝultro; tiel inter ili estiĝis amikeco.

Luj tagoj, ili ne parolis. Iutempe, ili babilis. Kvankam ili nenion parolis, tamen ili admirinde akordiĝis, ĉar ili havis similajn gustojn kaj identajn sentojn.

Matene de printempo, ĉirkaŭ la deka horo, kiam la rejuniĝa suno faris ŝvebi sur la trankvila rivero nebuleton fluintan kun akvo, sunlumo verŝis sur la dorson de du fanatikaj fiŝhokuloj kaj sentigis al ili varmecon de nova sezono. Morissot iutempe diris al sia najbaro: "Ha! Kia komforto!" kaj s-ro Sauvage respondis: "Estas nenio pli bona ol tio." Kaj tio sufiĉas por interkompreniĝi kaj reciproke respekti.

En aŭtuno, ĉe la krepusko, kiam la subiranta suno ruĝigas la ĉielon, ĵetis en akvon respegulon de skarlata nubo, la tuta rivero estis purpurigita, ekflamigis la horizonton, ruĝigis la du amikojn kiel fajro kaj jam origis la folifalantajn arbojn, kiu susure tremis de frosta vento. S-ro Sauvage rigardis kun rideto al Morissot kaj diris: "Kia pejzaĝo!" Kaj, kun du okuloj fiksrigardantaj sian flosilon, Morissot mirplene respondis: "Tio estas multe pli bona ol la avenuo, ĉu ne?"

Tuj kiam ili konatiĝis unu kun alia, ili energie premis la manon. Ili ekstreme emociiĝis pro renkontiĝo en tiel malsamaj cirkonstancoj. S-ro Sauvage ekĝemis kaj murmuris: “Vere estas eventplena aŭtuno!”. Morissot estis tre morna kaj ĝemis: “Kia vetero! Hodiaŭ estas la unua bona tago de la kuranta jaro.”

La ĉielo ja estis tute lazura kaj pleniĝis de sunlumo.

Ili pensoplene kaj triste marŝis ŝultro ĉe ŝultro. Morissot daŭrigis: “Hokfiŝi? Ho! kiel bona rememoro!”

S-ro Sauvage demandis: “Kiam ni reiros?”

Ili eniris en kafetejon kaj kune trinkis absinton, kaj poste ili promenis sur la trotuaroj.

Morissot subite haltis kaj diris: “Nu, ĉu ni trinkos alian glason da absinto?” S-ro Sauvage konsentis pri tio: “Laŭ via bontrovo.” Kaj ili eniris en alian drinkejon.

Elirante, ili estis forte kapturna, konfuza kiel homoj, kiuj estis plena de alkoholaĵo je malplena stomako. Estis komforte. Venteto estis juke karesanta ilian vizaĝon.

S-ro Sauvage estis ebriigita de milda vento kaj haltis: “Ni iras tien, ĉu bone?”

“Kien?”

“Iru hokfiŝi do.”

“Sed kien?”

“Al nia insulo. La avangardaj taĉmentoj francaj estas najbare de Colombes. Mi konas la kolonelon Dumoulin; oni lasos nin facile pasi.”

Morissot tremis de deziro kaj diris: “Konsentite. Mi certe venos.” Kaj ili disiĝis por preni ilian fiŝhokilon.

Post unu horo, ili ŝultro ĉe ŝultro marŝis sur la vojo. Poste ili venis en la vilaon, kiun la kolonelo okupis. Li iom ridis pri ilia peto kaj konsentis ilian fantazion. Portante paspermeson, ili ree ekmarŝis.

Baldaŭ ili trapasis la avangardajn taĉmentojn, transiris dezertan Colombes, kaj troviĝis ĉe la bordo de vinberkampetoj, kiu oblikvis al Seine. Tiam estis ĉirkaŭ la dekunua horo.

En kontraŭa flanko, la vilaĝo Argenteuil ŝajnis mortinta. La altaĵoj al Orgemont kaj Sannois rigardis malsupren al la tuta regiono. La granda ebenaĵo, kiu rekte etendiĝis ĝis la Nanterre estis malplena, tute malplena, kun nudaj ĉerizujoj kaj ĝia griza grundo.

Montrante per fingro la montpintojn, s-ro Sauvage murmuris: “La prusoj estas tie

supre!” Du amikoj maltrankviliĝis kaj paralizigis antaŭ ĉi tiu dezerta loko.

“La prusoj!” Ili neniam vidis la prusojn, sed de pluraj monatoj ili sentis, ke prusoj estis tie, ĉirkaŭ Parizo, ruinigis Francion, rabinte, masakrinte, kaj malsatiginte. Tiuj ĉi homoj estis nevideblaj kaj ĉiopovaj. Kaj specon da superstiĉa teruro ili aldonis al la malamo, kiun ili jam havis kontraŭ ĉi tiu nacio nekonata kaj venka.

Morissot balbutis: “Ha! Se ni renkontas prusojn, kion fari?”

S-ro Sauvage respondis kun tia tono pariza ŝerceme ĉiaokaze: “Ni oferas al ili frititan fiŝon.”

Sed ili, timigita per la silento de ĉirkaŭaĵo, hezitante, ne kuraĝis aventuron sur la kampo.

Fine, s-ro Sauvage decidis: “Iru, ekiru! Sed iru zorgeme.” Sekve ili malsupreniris sur la kampo de vinbero, kliniĝinte kaj rampinte, utiliginte arbetojn kiel ŝirmadon, per okuloj maltrankvile ĉirkaŭenrigardante, streĉante la orelojn.

Nun nur transirinte peco da tero nuda ili povis alveni al la bordo de la rivero. Ili ekkuris; kurinte al la krutbordo, ili tuj kaŭris en la sekan fragmitaron.

Morissot gluis sian orelon sur la tero por aŭskulti ĉu iuj marŝis en la ĉirkaŭo. Li nenion aŭdis. En la ĉirkaŭo estis neniu alia krom ili ambaŭ.

Trankvilaj, ili ekfiŝhokis.

En ilia kontraŭa flanko la forlasita insulo Marante kovris la rigardon. La dometo de la restoracio estis fermita, kiu ŝajnis forlasita dum pluraj jaroj.

S-ro Sauvage prenis la unuan gobion, Morissot kaptis la duan, kaj ili de tempo al tempo levis iliajn fiŝkanojn kun arĝenthela skuinta besteto sur la fino de la fiŝfadeno: vera fiŝhokaĵo mirakla.

Ili delikate enmetis fiŝojn en retsakon, kun tre kompaktaĵoj maŝoj, kiu estis trempita en akvon sub iliaj piedoj. Kaj plezurega ĝojo penetris en ilian koron, ĉi tiu estis ĝoja animstato, kiun oni kaptis kiam oni retrovis plezuron, kiun oni estis forpreninta de ili delonge.

La varmeta suno sunumis iliajn ŝultrojn komfortige varma; ili nenion plu aŭskultis; ili ne pensis plu pri io ajn; ili ignoris ĉiujn aliajn aferojn en la mondo; ili sciis nur fiŝhoki.

Sed subite, surdiga bruvo, kiu ŝajnis veni de subtero, tremigis teron. La kanono rekomencis sonori.

Morissot la kapon turnis malantaŭen, kaj rigardante de supro de la krutbordo, li vidis tie,

maldekstre, la grandan silueton de la monto Valérien, kiu portis supre sur la monto tufon da blankaj egretoj, kiu tuj ŝprucis el faŭko de kanono pulvofumon.

Kaj sekve de tio troviĝis alia tufo da fumo, kiu ŝprucis el supre de la fortigaĵo; post momento nova rulado de detonacio.

Poste, konstante, kaj de tempo al tempo, la monto ĵetis sian haladzon de morto, blovetis sian vaporon, kiu malrapide leviĝis en la kvietan ĉielon, fariĝis nebulo supre sur ĝi.

S-ro Sauvage levis la ŝultrojn kaj diris: "Jen, ili ekagas denove."

Morissot, kiu maltrankvile rigardis la plumon de sia flosilo profundiĝis malsupren unu post alia, la pacema homo abrupte koleris kontraŭ ĉi tiuj rabiuloj, kiuj tiel interbatiĝis, kaj li grumblis: "Kiel stultaj ili estas por buĉi unu la alian."

S-ro Sauvage ripetis: "Ili ja estas malpli bonaj ol brutoj."

Morissot, kiu ĵus kaptis albumuson, diris: "Pensu, ke ĉi tio estos por ĉiam tia, kondiĉe, ke ekzistas registaroj en la monto."

S-ro Sauvage interrompis lin: "Se troviĝus la respubliko, ĝi ne povus deklari militon ..."

Morissot interrompis: "Havante la reĝojn, oni militas eksterlanden; havante la respublikon, oni militas en la lando."

Ili paceme ekdiskutis, malkonfuzinte la grandajn problemojn politikajn kiel bonkoraj homoj kun sana racio kaj limigita povo; ili venis akorde al la konkludo, ke oni estos neniam liberaj. Kaj sur la monto Valérien kanonoj tondris senĉese, dinamitis pere de bomboj la francan domojn, frakasis la vivojn, detruis la estaĵojn, finis multe da revoj, ĝojoj kaj feliĉoj, kiujn oni atendis kun espero. Senfina sufero ankoraŭ trafis virinojn, filinojn kaj patrinojn en alia lando.

"Tio estas la vivo," diris s-ro Sauvage.

"Tio estas nenio alia ol morto," ridante diris Morissot.

Tiam ili tremis de timo pro la sento, ke iuj alpaŝis malantaŭ ilia dorso. Turninte la okulojn, ili trovis kvar homojn, kvar armitajn altkreskulojn barbajn, vestitajn kiel servistoj, portintajn livreojn kaj kaskedojn. Ili staris tuj ĉe iliaj ŝultroj, al ili celante la tubaperturojn de siaj pafiloj.

La du fiŝkanoj defalis de iliaj manoj kaj falis en la riveron.

Nelonge poste, ili estis kaptitaj, ligitaj, elportitaj, ĵetitaj en barkon kaj transportitaj sur la insulon.

Malantaŭ la domo kiun ili estis opiniinta forlasita, ili trovis ĉirkaŭ dudek germanaj soldatoj.

Haroza giganta ulo, kiu fumis grandan pipon el porcelano, rajdante sur seĝo, demandis per pura franclingvo: "Tre bone, sinjoroj, vi bone hokfiŝis?"

Tiam soldato metis ĉe la piedoj de oficiro retsakon plenan de fiŝoj, kiun li zorgeme reportis.

La pruso diris ridetante: "He, he, mi vidas, ke tio iras ne malbone. Sed la problemo kuŝas en alia afero. Aŭskultu min kaj ne konfuzu. Laŭ mi, vi estas du spionoj senditaj por gvati nin. Mi vin kaptas kaj mi vin pafmortigos. Vi ŝajnigas vin fiŝhoki por kaŝi viajn intencojn. Ĉar vi falas en miajn manojn, jen vi havas! Tio estas milito."

"Sed ĉar vi estas eliri el la avangardaj taĉmentoj, vi certe havas la pasvorton por reveni. Vi ĝin diras al mi kaj mi pardonas al vi."

Du amikoj, lividaj, silente staris ŝultro ĉe ŝultro, kaj kvar manoj iomete tremis pro tikoj.

La oficiro plue diris: "Scios neniu pri tio, kaj vi povos pace reveni. La sekreto malaperos kun vi. Se vi rifuzas, tio estas nur vojo al morto, kaj vi tuj estas mortigotaj... Elektu."

Ili restis senmovaj, kaj ne malfermis la buŝon.

La pruso, ĉiam kvietan, diris montrinte la riveron per mano: "Pripensu, ke post kvin minutoj vi estos en fundo de la akvo. Post kvin minutoj! Vi certe havas gepatrojn kaj gefilojn?"

La kanonoj sur la monto Valérien tondris ĉiam.

Du fiŝhokuloj restis silentaj, starante. La germano donis ordonojn per sia lingvo. Poste li delokis sian seĝon por ne esti tro proksime de militkaptitoj; kaj dek du soldatoj venis kaj stariĝis dudek paŝojn fore de ili, kun pafiloj apogantaj ĉe siaj piedoj.

La oficiro plue diris: "Mi donos al vi ankoraŭ unu minuton sen du sekundoj pli..."


Poste li abrupte leviĝis, aliris apud du francojn, prenis s-ron Morissot je la brako, tiris lin pli malproksimen, al li duonvoĉe diris: "Rapidu, kia estas ĉi tiu pasvorto? Via kamarado scios nenion, mi ŝajnige kompatos vin."

Morissot respondis nenion.

Tiam, la pruso tiris s-ron Sauvage kaj metis la saman demandon al li.

S-ro Sauvage ne respondis.

Ili ree kune staris flanko ĉe flanko.



PENSEO

N-ro 191

Sept. / 2007

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 18-a jaro <http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm>

Sheng Congwen (1902-1988)

PARO DA GEEDZOJ

.....konsentite. ĉio jam estis en ordo.

"Nu, bone, bone, mi iros mi iros ! laŭ via parolo mi agos!" Dirante la virino refoje rigardis al la viro, laŭ maniero speciala de virino.

"Kiel vi diros?" La penso de zorgema viro ĉiam estis pli profunda ol virino. Li ja timis ke ŝi forgesus.

"Kiel diri? Ĉu vi demandas, kiel mi diru en tiu okazo?"

"Jes!" La viro jam senpacience urĝis ŝin tuj diri.

"Mi lasos lin elpreni tiun objekton, ke li legu, ke li..."

"Diru simple, ke vi post lia ĉirkaŭpreno, vi!"

"Jes, post kiam li ĉirkaŭprenis min, mi diros al li, ke ne faru tion. Mi diros ke mi jam havis edzon, mi ne povas fari tian stultaĵon kun alia viro. Mi diros, ke se tiu viro sciis, li mortigos min per ponardo, li strangolos min per ŝnuro. Mi diros ke mi suferis ofendon. Mi rakontos tion al tiu mia viro. Mi diros ke mia bonfamo estas ruinigita. Ruinigita estas ankaŭ la honoro de mia edzo...Mi ploros, ne permesante lin foriri...Kaj mi diros ke mi dissciigu tion al la publiko, ke ĉiuj sciu ĉitie, ke ĉiuj juĝu la aferon por mi."

Dum la virino ripetis la produktitajn frazojn, la viro kapjesis, kapjesis, kapjesis. Vidante ke la virino finis parolon, li manklakis, esprimante sian ĝojon kaj kontenton pri ŝia kompetenteco. Kaj li admonis: "Ne forgesu

dum la necesa momento! Ne ploru senlarne! Ne..."

Fakte, la zorgo pri senlarne ploro estas superflua. Pri tio la viro sciis pli ol sia virino. Li sugestis ke la larmoj estu abundaj. ĉar la epoko progresis. Malmulte da virinaj larmoj ne sufiĉas por konkeri koron de viro.

Ĉar ordinare larmoj malfacile timigis lin, li sugestis pri multo da larmoj. Ŝi respondis ke tio certe estas plenumota. Al virino, kiu nur se kapkline ekploris, larmoj certe elfluos. Tio estis pli facila ol akuŝo, la grava afero.

Li kredis tion. Tamen, se oni ankaŭ povus anticipi ekzerci sin pri larmado, kompreneble la viro ne oponus tian "provludon".

"Mi fidus vin. Agu laŭplane! Mi certe venos fini." La viro diris ĝentilmane.

"Ho, vi nepre venu! Sen via alveno mi ne povos elsceniĝi. Vi atendu anticipi ĉe la ŝtiparo, silente, ne lasinte ke aliaj homoj sciu! Vi ekaperu kiam vi aŭdis mian ploran krion 'helpu!'"

"Ho, tiam mi certe venos. Vidante ke mi batas kun minaco buĉi lin, vi nur ploru neglekte! Mi koleros ĝis tia grado por fari murdon. Tiam mi senigos al li fieron. Nur tiam vi plorante konfesu al mi ion ĉion. kaj ni vidu kiel li reagos?"

"Mi plendos ke tiu ulo volis senvestigi min! Ne! Mi diru ke li perforte devigi min fari tian malĉastaĵon. Li devigis min kunkuŝi en tia loko. Li petis ke mi fuĝu kun li, ke mi..."

"Sed ne diru tion, se li parolis al vi ne pri fuĝo!"

"Ho jes! Mi ne diru kion li ne diris, mi diru nur kion li diris. Sed tamen kion fari se li diris nenion?"

"Ne eble, tiu viro ne estas muta! Ĉu viro kiu volas allogi alies edzinon povus esti stulta? Vidante vian nekonsenton, li certe serĉos multe da paroloj por tenti vin! Lia parolo certe estos pli multa ol kiom mi povas imagi. Tiu estas fiulo. Vi ne estu allogita de lia bela aspekto kaj lerta lango kaj efektive kun li..."

"Kio? Ĉu mi estas tia virino?"

"Ho, vi ja estas fidinda por mi! Ĉar tio estas profito de ni ambaŭ. Mi ne havas egoistan intencon. Por utilo de la ŝtato ni ja devas puni tian fiintencan junan dandon. Sed mi devas atentigi vin: estu singardema! Agu laŭ mia artifiko, ni akiros monojn sen trompiĝo. Akirinte monon, mi aĉetos ŝtofojn kiuj plaĉas al vi. Ĉu vi ne diris ke vi bezonas kelkajn bonajn vestojn por gastoj?"

"Ho, mi volas la ruĝan, ne la skarlatan."

"Nu! Ni aĉetu la ruĝan! Sed ĉu vi memoris mian parolon?"

"Jes! Mi ne estas trijara infano!"

"Do ripetu, refoje!"

"Ho, mi ne ripetu. Mi jam forgesis." Tio estas intenca rifuzo, ĉar la viro rigardis ŝin tro malsaĝa.

Aŭdinte tian tro sekan respondon, la viro diris: "Se vi jam forgesis, do for la aferon!"

"For, do for! Ĉar ne mi mem bezonas monon."

"Ho, ĉu vi opinias min vivanta kokrito?"

"Ba, vi estas honesta, rangulo! Kiu ne scias tion? Tian kokradon ja mi mem deziras!"

"Putino! Vi meritas baton pro tia parolo! Se vi vere adultos, mi rabu vian vivon!"

"Ho, mi adultos, ĉu laŭ mia propra deziro? Ĉu mi volas ĉasi monon? Se mi estas putino, kio vi?"

"Mi estas kokrito, vivanta kokrito! Nun kokrito batmortigos vin!" Kaj la viro kun grincanta dentaro iris al la virino. per unu mano li ekkaptis al ŝi mallongan hararon kaj trenis malantaŭen. La virino ekfalas teren.

Fortaj vangfrapoj falis al ŝiaj du vangoj. piedbato al ŝia talio. La virino ekploris kvazaŭ en trejnado. Jen vere brila provludo de

larmado. Kvankam tiom multe da larmoj, tamen ankoraŭ nur provludo!

"Ho vi batmortigu min, batmortigu min! Mi ne volas plu vivi en la mondo!" La virino plore plendis ruliĝante sur la tero.

"Vi mem mortu. Mi jam estas laca!" Dirante la viro forlasis la virinon. Li manfrapis por forigi polvojn desur polmoj kaj rikanis starante en la ĉambro.

"Ho, vi batmortigu min! Tiam vi povos prenu pli junan belulinon ke ŝi ĉasu monojn por vi!"

La viro respondis nur per silenta rikano.

"Kial ĉesigi vian baton? Batu! Piedbato!"

La viro ankoraŭ rikanis, kun iom da pento. Tamen ĉar la edzo estas ĝentilmano, li posedu la stilon de ĝentilmano, tial li ne povas konfesi sian eraron kiel tiaspeca viro...

La virino laciĝis de plorado, de plendado. Sidante sur tero ŝi meditis. ŝi ekridis. ŝi ne bezonis persvadon de la viro. ŝi mem stariĝis, frape forigis de si polvojn kaj iom ordigis al si hararon.

Ambaŭ okupis respektive angulon de la salono, kvazaŭ jam kun konsento pri repaciĝo.

Iu frapis je la pordo ekstere. La viro iris gvati tra la pordfendeto, kaj tuj rapidis revenen al la virino. Li fariĝis afabla. Li demandis afable al la virino, ĉu ŝi volonte agos laŭ la malnova interkonsento.

"Volonte." respondis la virino.

"Li jam alvenis. Do vole nevole ludu la dramon en nia hejmo."

Aŭdante ke tiu homo jam alvenis, la virino eksentis streĉon en sia koro.

Aŭdinte la diron de la viro ke ludu la dramon en sia propra hejmo, la virino ekridis. Tiu rido signifas ŝian konsenton pri la honora propono far la edzo.

"Iru malfermi la pordon, kaj mi foriru tra la malantaŭa pordo."

"Vi..."

"Mi nepre devas foriri! Mi revenu post unu horo. Bone ludu la dramon dum unu horo. Se la intrigo estus plilongigota, mi revenos en

malĝusta momento."

Audiĝis denova frapado sur la pordo.

"Prefere vi revenu post kiam mi vokas 'helpu!'"

"Jes, bonege. Mi ne revenu antaŭ via voko."

"Konsentie. Nun foriru!"

Ili kisis unu la alian, kvazaŭ per la kiso garantias. Post kiam ambaŭ ricevis la garantion, la virino iris malfermi la pordon, kaj la viro malaperis tra la angula pordo de kuirejo.

La virino enlasis gaston al salono, kaj poste de la salono al ĉambro.

La gasto estas junulo. Aŭdinte ke la dommastro ne estas hejme, la gasto fariĝis bonhumora kaj ankaŭ tre kuraĝa, ĉar junulo kutime rigardis la hazarde ricevitan oportunon favora ŝanco.

La virino invitis la gaston kune sidiĝi. Kaj la gasto kondukis ĝuste kiel la mastrino atendis. Tempo malrapide pasis, kaj la gasto malrapide ŝanĝis sian konduton.

Sed verŝajne la virino forgesis krei: "Helpu!"

Ŝi eĉ lasis ke la gasto ricevis ĉion kion li deziras.

Ŝi faris aferon eĉ ekster sia propra atendo.

Evidente kun venĝemo ŝi lasis ke la juna gasto senbride agu sur ŝia korpo.

La gasto eliris la domon, kaj tuj ĉe la enirejo de la strateto renkontiĝis kun la dommastro.

La dommastro konfuziĝis, dum la gasto ruĝiĝis. Tamen, kiam du amikoj renkontiĝis, ili devis paroli ion. Do la gasto komencis:

"Ha, mi atendis vin tutan horon, sed vi ankoraŭ revenis, do mi akompanis la bofratinon sidi longan tempon..."

"Ho, ĉu tiel okazis? Pardonu, pardonu! Sidiĝu ankoraŭ momenton!"

Rigardinte sian brakhorloĝon, la gasto diris: "Jam urĝis la tempo. Morgaŭ mi revenu."

"Sed vi venas ja por iu afero, ĉu ne?"

"Aĥ, nur bagatelo. Morgaŭ ni revidu nin en la parko."

"Sed kiam?"

"Je la sepa posttagmeze."

"Bone. Je la sepa, akurate."

Fakte la gasto diris al la mastro la saman tempon kiun li mendis por rendevuo kun la mastrino. Tamen li jam ne havis tempon korekti kaj haste forrapidis.

La mastro revenis sian hejmon. Li vidis ke la edzino kuŝis en la lito, ankoraŭ ŝajnigante sin dormanta, kun paro da kapkusenoj sub sia talio. Li subite komprenis ion. Li iris al la edzino, kun furioza kolero, li ekkriis laŭte kaj tuj sin ĵetis sur la korpon de la edzino.

.....

La sekvan tagon, la gasto atendis en la parko ĝis la 9-a vespere kaj ankoraŭ ne volis foriri.

Tiu naiva homo ankoraŭ supozis, ke lian vanan atendon kaŭzis certe subita malsaniĝo de iu el la geedzoj, kiuj ne povis veni al la rendevuo en parko.

La trian tagon, li vizitis al la bona paro, kaj nur tiam li informiĝis, ke la gemastroj ambaŭ suferis de neatendita stranga malsano kaj nun vizitis hospitalon por ŝanĝi al si bandaĝon.



elĉinigi **Guozhu**

Kant-teksto



Ruĝas l' Orient'

Ruĝas l' orient',

jen leviĝas sun'.

Maŭ Zedong nun elstaras en Ĉini'.

Li feliĉon kreas por popol', (hu er hei ja)
 Al ni viv-savanto estas li.

Maŭ Zedong
 amas nin.
 Gvidas nin li kun defi',
 Por konstruad' de Nov-Ĉini', (hue r hej ja)
 marŝi antaŭen kun energi'.

Kiel sun',
 Komparti',
 ja prilumas ien ajn.
 Kie estas Komparti', (hu er hej ja)
 tie liberiĝas la naci'.

Elĉinigi**s Kanglong**

KIEL SUN' SUR ORIENT'

En Ĉini', Mao zedong
 Kiel sun' sur orient',
 Portas bonon al popol',
 liberiĝon en atend'.

Prezidant' Mao Zedong
 Gvidas popolon antaŭen
 Por novigo de ĉini'
 Bataladi al la venk'.

Komparti' kiel sun',
 Portas lumon kun favor'.
 Kie venas komparti',
 Liberiĝas la popol'.



Elĉinigi**s Vadant**

Li Shangyin (813-958)

Chang E*

Sur glimekran'kandela ombro fundas,
 La Lakta Vojo en aŭror'profundas.
 Ŝi pentas, ŝtelglutinte eliksiron,
 soleco ĉiunokte ŝin inundas.



trad. **Shi Chengtai**

**) feino en la Luna Palaco laŭ ĉina legendo. Iam ŝtelmanĝinte eliksiron, kiun la Ĉiela Reĝino Wang-mu donacis al ŝia edzo Yi, ŝi alflugis feine en la lunon sole kaj restas tie ĉiam.*

Anonima:

LUNO

Lante leviĝas el easta maro,
 iom post iom venas al nubaro.
 Ĉi-nokte plenrondiĝas luna disko,
 Kie ne lumas ĝia brila klaro?

Trad. **Guozhu**



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Adreso: Fremdlingva Fakultato, Nanhai
 Kolegio de Sud-Ĉina Normala Universitato,
 Nanhai, Guangdong 528000, Ĉinio


Tel: (0757) 86366253 (hejme)

E-poŝto: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin
 turnu al www.elferno.cn/penlisto.htm





PENSEO

N-ro 192

Okt. / 2007

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 18-a jaro <http://www.elperno.net/penseo/penlisto.htm>

Almozpetanta Virino

Sennoma

“Frato, ĉu mi petu de vi helpon?”

Eksurprizite, Chen Gen malsupreniris de sia biciklo, sur kies antaŭa parto sides lia unu-kaj duon-jara fileto. Antaŭ li staris juna virino, vestita pure, kun pakaĵo ĉirkaŭ sia brako. Li ŝin ekrigardis kun mieno perpleksa.

“Frato, jam preskaŭ unu jaro, ekde kiam mi venis ĉi tien por prilabori. Je la jarfino, mi volas hejmenreveni,” ŝi daŭrigis. Li nekomprene fikse rigardis ŝin. Li parolis al si: Hejmenreveni? Do hejmenrevenu! Kial vi parolas pri tio al mi?

Tiam, kun embarasita vizaĝesprimo, ŝi malklare kaj mallaŭte diris, kun ruĝiĝintaj vangoj, “Mi jam poŝtendis mian monon antaŭtempe al mia hejmo kaj tenas monon sufiĉan nur por hejmenreveni. Ekster mia atendo, mia mono estis ŝtelita de poŝtoŝtelisto. Mi devigite peti helpon de aliaj. Kaj nun mi jam havigis al mi preskaŭ sufiĉe da mono. Ĉu vi bonvolus doni al mi dudek yuanojn, tiel ke mi havu sufiĉe da mono por aĉeti biletan. Post kiam mi revenos hejmen, mi poŝtendos al vi tiun sumon.” Je tio, ŝi donis al li la adreson de sia loĝejo.

Ĉimomente, li venis al klara kompreno, ke la ino antaŭ liaj okuloj certe estas trompistino, ĉar li jam spertis multe da samaj okazaĵoj. Por diri honeste, nun li tenis kelkcent juanojn en la poŝo, per kiuj li volis aĉeti kelkajn decajn

legomojn kaj vinon por amiko-vizitantoj al sia hejmo.

Laŭkutime aĉetadon en bazaro faras virinojn. Pro sia amemo al la edzino, kiu jam laboris tuttage, li memvole faris aĉetojn anstataŭe. Li kaj lia edzino vivas perfekte, kaj la fileto estas la kristalo de ilia geedziĝo, tiel ke li tre ŝatas la fileton. Kaj nun, li eĉ kunportas lin dum aĉetado. Kaj lia edzino okupiĝas pri servado al gastoj nun.

“Bonfaru al mi, frato!” daŭre petis la junulino. Li volus forturni kaj forlasi, sed kiam li rimarkis ŝian peteman rigardon, li ne povis turni sian dorson al ŝi. Pro tio, li fabrikis sian unuan mensogon dum sia tuta vivo, “Fratino, mi eksedziĝis. Estas malfacile vivi por mi kaj mia infano. Mi ne havas multe da mono. Se mi havus, mi certe donus iom al vi.”

Ĉe tio, ŝi, fikse rigardante la infanon rajdantan sur la biciklon, murmured iris, “Kia kompatinda infano! Kia senkora patrino! Ŝi eĉ foriris sen atento pri la infano!” Dirante, ŝi karesis lian kapeton. La infano ekploris laŭte, kiam la fremdulino tuŝis lin je la kapo.

Tio des pli ĉagrenigis la virinon, kiu nereteneble montris sian patrinecon. “Aj! Kiel proverbo diras, estas prefere lasi altrangan patron morti ol almozpetantan patrinon. Tio estas vera. Rigardu, kiel kompatinda estas la infano sen patrino!” ŝi daŭrigis. “Mia deksex-jara filo devus komenci lernadon en elementa mezlernejo ĉijare, sed pro malriĉeco, ni ne kapablas pagi por lia lernado. Krome lia patro mortis en trafika akcidento. Tamen mi neniel lasas lin ĉesi lernadon. Jen mi venis perlabori ĉi tie por lernopago.” Post kiam ŝi

finis sian parolon, larmoj perils senĉese sur ŝiaj vangoj.

Dum momento, kortuŝite de ŝia sincereco, Chen montriĝis embarasita. Li eĉ sentis iom da pento pri sia mensogado al ŝi. Apenaŭ li estis dironta ion, kiam ŝi, post momenta pripensado, elpoŝigis malrapide bankbileton de dek yuanoj, ĉifitan ŝajne pro longa tenado en la mano. Li tuj sin sentis senrimeda, ne sciante, kion ŝi volas fari. Neatendite, ŝi ŝovis la bileton en lian manon, dirante, “Rapide aĉetu iom da nutraĵo por la infano! Ne lasu la infanon suferi!”

Stuporiĝinte, li tuj rifuzis, “Ne, neeble. Kiel mi povus akcepti vian monon. Vi ankoraŭ volas hejmenreiri...” Forviŝinte siajn larmojn, ŝi diris, “Tio estas nenio. Ĉiuokaze tiu sumo ne sufiĉas por hejmenreiro. Poste mi faros pli da almozetado por sufiĉe da mono. Nun estas multaj bonfarantoj sub la suno!” Post tio, ŝi ĵetis profundan ekrigardon al la infano kaj sin turnis foriri.

Rigardante ŝian forirantan dorsfiguron, li sentis ŝian ekrigardon piki lian koron. Abrupte li ekhavis varmiĝon en siaj okuloj kaj acidecon en la nazo, kun larmoj fluantaj sur la vizaĝo. Li hasteme piedmovis la biciklajn pedalojn kaj atingis la virinon. Elpoŝiginte bankbiletojn de tricent yuanoj, li firme ŝovis ilin en ŝian manon. Post tio, li hejmenrevnis, rajdante la biciklon.

Rigardante la monon en la mano, ŝi staris, ŝtoniĝinte.



Elĉinigi **Hongjia**

Ĉineske

Eto

Nacia Festo

— laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling*

floron

floron

ankaŭ nian koron

al la land’ sincere

kaj respekte vere

reve

reve

alten flugu meve

*Tiaoxiaoling: unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4 silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono’ roso-soro.



Bai Juyi

(772-846)

Bela Sud’

— laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Bela sud’

kun ĉarma vid-ĝu’:

ruĝaj floroj laŭborde

sub sun’ blu-verda akv-flu’.

Memor-nodo, ĉu?

Trad. **Sam**

*Sopir-al-sudo: unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo de xa,xa,a (x=senrima).

Lily

Mi Jam Spertis

— laŭ ĉinesko Busuanzi*

en lumo febla

mia ĝigolo

ĉeorele murmuris

“ĉu nova bolo?”

mi tre scivolis

“ĉu pli da folo?”

li do surrampis sur min

kun kac’ malmolo

li ŝovis kapon

inter femurojn

miajn kaj dispuŝis miajn

neĝblankajn krurojn

li serĉis buŝe

amorplezurojn

perlange lekis vole

nigrajn velurojn

sublipoj miaj

jen jam sukplenis

dum lia lang’ soifa

volupti penis

al mia pordo

la lango venis

petola kaj avida

eke festenis

li lekis, kisis

ĝoje fervore

buŝinon molan mian

same amvore

aĥ, kia juko

ĝis ĝu-angore

trakorpe kuris fulme

nervo-stupore

ĉe buŝo mia

rigidis kaco

lia malpacienca

jam en malpaco

li spire veis

“hej, erinaco

mia, ĝin buŝe prenu

kun ina graco!”

mi ĝin favoris

per buŝa preno

mordetis akve ŝmace

sen ajna ĝeno

mi ĝin buŝpremis

en firma teno

senmove ĝis korŝira

ĝua festeno



mi glitis lante

de ĝia glano

ĝis la radiko kvazaŭ

per buŝa bano


aŭdiĝis tuje

ĝema vulkano

jen kaj jen rapideme

pro am-elano

mi plirapidis



PENSEO

N-ro 193

nov. / 2007

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 18-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Guozhu


Hurao al Chang'e N-ro 1

(2007-10-24)

—laŭ ĉinesko Haoshijin*

**Grava evento
en ora aŭtuno ---
Lanĉas vojaĝo de
Chang'e al luno!
Realiĝas miljara
rev' en fortuno.
Komenciĝas nova
paĝ' ekde nun.**

*ĉina fikforma poemo el du strofoj po kvar versoj de
56,65 / 75,65 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa
(x=senrima)



Komencantino

Bonan Vojaĝon

—laŭ ĉinesko Pozhenzi*

gratulon al sukcesa pafado de lunsonda
satelito

**kun flamanta vosto
la lunsatelit' sor
sin pafis vertikale
jen por scienca esplor'
ĉu la ĉina glori'?**

**gratulon, gratulon
en ĉi solena hor'
al niaj sciencistoj
pro ties pena labor'
kaj frukta valor'**

* ĉina fikforma poemo el du strofoj po kvin versoj de
66,77,5 silaboj, laŭ rimaraĝo xa,xa,a

Eto

Ascend' al Luno

—laŭ ĉinesko Shiliuziling*

Okaze de pafado de l' ĉina lunsatelito

**nun
la ĉinoj per forta kun'
raketon
pafas al la lun'**

**por
pac' kaj scienca esplor'
ekflugas
la satelit' sor**

**en
kosmospac' kun esperplen'
ĝi strebas
al luna ĝarden'**

**ĝi
ja la prosperon de Ĉini'
kunportas
al feina ŝi****

**ĝoj'
nin ebriiĝas en larm-roj'
kajflugas**

laŭ alluna voj'

*ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de 1,7,35 silaboj,
laŭ rimarango aaxa

** aludas Chang'e, feino vivanta sur la luno laŭ la
ĉina legendo.



Noveleto

Ŝuldo je Ununokta Dormo

You Rui

Viro akiris edzinon per dolĉaj vortoj. Li diris, “Mi ĵuris per la ĉielo, ke mi ame traktas vin dum la tuta vivo, kaj ĉiuokaze mi restadas kun vi sendisiĝe.” La virino ekridetis, kaj ŝi reciprokis samajn vortojn, kiujn li diris.

Ekde la kvina monato de novgeedziĝo, ili komencis kvereli nur pri begateloj, sed en furioza maniero. Forte ĵetinte tason teren en pecetojn, li diris, ke li ne plu vivas tiamaniere. Ŝi faligis larmojn senparole.

La viron havis amikon nomatan A Chang, kiu vivis en la sama loko kun li ĝis adoltiĝo. A Chang estis bona junulo, malmobilizita el armeo antaŭ nelonge. Lin ŝatis multe da junulinoj, sed li ne falis en amaferon dumtempe. Ĉiŭfoje, kiam li kaj ŝi kverelis, li emis elstari por ilin pacigi. Nur ĝis kiam ilia kverelo kvietiĝis, li foriris. Ambaŭ li kaj ŝi kovis dankemon al li. Tamen li kaj ŝi de tempo al tempo ekhavis kverelon pli kaj pli severe.

Ĉiŭfoje la kverelado estis tiel intensa, ke la viro foriris, frape ferminte la pordon post si. Kiam ŝi singulte ploris, alvenis A Chang por pacigi la kverelon.

Ĉe la mateno de la sekva tago, la viro revenis. Kiam li malfermis la pordon, lin trafis la nevidenda sceno — A Chang kaj lia edzino dormis eĉ sur la sama lito. La viro ekkoleriĝis furioze. Svingante siajn

pugnojn, li sin ĵetis antaŭen, sed la virino baris al li la vojon. Sen multe da klarigado, ŝi diris nur unu vorton “eksedziĝo”. Lia respondo estis “tuj, ni eksedziĝu!”

Li kaj ŝi eksedziĝis tre baldaŭ. Tamen, la eksedzino ne kunvivis kun A Chang, kiel ni eblus imagi. Ili eĉ ne vidis A Chang-on. Ŝajnis, ke Tiu jam malaperis senspure.

Ŝi komencis sian novan vivon, kaj samtempe ŝi ne forgesis peti informojn pri A Chang.

Iun tagon post du monatoj, ŝi finfine informiĝis pri lia spuro. Li jam enhospitaliĝis kaj pretis ricevi graven operacion. Aĉetinte donacon haste, ŝi rapidis al la hospitalo. Kiam ŝi eniris lian malsanulejon, ŝi ŝtoniĝis. Anstataŭ A Chang, ŝia eksedzo sides tie en maltrankvilo.

Levante sian kapon, li vids ŝin. Altrudante amaran rideton, li diris, “Vi venas finfine.”

Ŝi demandis, “Kie estas A Chang?”

“En operaciejo.”

“Kial vi troviĝas ĉi tie?” ŝi demandis.

Senparole, li ekbrulis cigaredon kaj ekŝuĉis. Post momento, li diris, “Kial li ne estas kun vi? Ĉu vi eĉ ne scias pri lia operacio?”

Kun kapo klinita, ŝi ne eligis vortojn plu.

Ĝuste tiam, la kuracisto envenis kaj demandis al ili, kiu estas lia familiano.

Li kaj ŝi stariĝis samtempe. La unua li ekparolis, “Kio pri li, doktoro?”

La kuracisto diris, “Vi ĵus donis la antaŭpagon, ĉu ne? Do vi povas ĝin repreni. La operacio jam finiĝis. Mi diru al vi kun granda bedaŭro, ke la operacio malsukcesis. Tamen ni jam faris ĉiujn klopodojn.”

“Kia operacio?” ŝi ne komprenis.

“Ĉu vi ne scias?” Stranga esprimo aperis sur la vizaĝo de la kuracisto. Kaj li sin turnis al la viro kaj klarigis, “Ĉar la seksorgano de malsanulo estas grave vundita dum longa tempo, ni povas fari nenion por restarigi lian seksan funkcion. Kiam li vundiĝis kiel soldato, li devus ricevi ĝisfundan kuracadon, ĉu?”

La viro pene ĵetis ekrigardon al la ĉielo kaj diris, “Finite! Diable! Lia tuta vivo estas finite.” Poste, li sin turnis kaj rigardis al ŝi.

Ŝia vizaĝo tuj ekrugiĝis. Movetante siajn lipojn, ŝi volis diri ion, sed ne povis elbuŝigi unu vorton.

Li diris, “Ĉu necesas klarigi? Mi jam komprenis delonge.”

Ŝi ekploris singulte, dirante, “Mi faris tion pro senrimedeco. Se mi ne faris tion, ĝis kiam nia kverelado daŭrus? Tio nur maljuste kulpigis lin. Mi havas dankemon al li dum mia tuta vivo.” Post tio, ŝi elkuris el la hospitalo.

Ekstere tutnova aŭtomobilo atendis ŝin.

Rigardante ŝian dorsfiguron, li ekridetis. Elpoŝiginte poŝtelefonilon, li plezure klakis butonojn. Aŭdiĝis koketa voĉo el la alia ekstremo.

Li diris, “Kara, sendu al mi pliajn 5000 yuanojn. Mi devas trovi pli bonan hospitalon por A Chang.

“Aĥ, ĉu ankoraŭ ne sufiĉas? Vi estas vere bona al via amiko.”

“Vi eraras,” li diris. “A Chang estas ne nur mia amiko, sed ankaŭ bonfaranto por ni ambaŭ. Kuraci lian malsanon estas la tiama kondiĉo, per kiu li promesis helpi min. Des malpli, ke ni restigu al li ŝuldon je ununokta dormo dum la tuta vivo, ĉu?”

Li ekridetis denove.



elĉinigis **Hongjia**

Ĉineske

Lily

Deflorado de Vagulino

—laŭ ĉinesko Busuanzi*

**mizere vagis
de strat' al strato
ŝi adoleskantino
en malsan-stato**

**gepatroj ŝiaj
kun unu frato
droniĝis en diluvo
pro sorta bato**

**senhelpe sola
kun peza koro
forlasis la vilaĝon
ŝi al la foro**

**ŝi almozpeticis
en malhonoro
sub moka pririgardo
sen ajn pudoro**

**noktiĝis foje
sur tero frida
ŝi dormis duonnuda
kun korp' rigida**

**sendube tio
per ĝuo vida
invitis amorantojn
kun pens' insida**

**ŝi aŭdis sonĝe
“cervido mia
obeu, ne kriaĉu
jen lud' pasia”**

**ŝi svage sentis
sur korpo sia
palpadon de manego
ŝajne mania**

**ĝi jen deŝiris
kun granda forto
kalsonon mincan ŝian
— la virgan pordon**

**ŝi jam panikis
ege ĝis morto
instinkte ŝi rezistis
per korpa tordo**

	<h1>PENSEO</h1>	<p><i>N-ro 194</i> <i>Dec. / 2007</i></p>
<p>Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994</p>		
<p>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 18-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm</p>		

Varman Gratulon al Okazigo de la 1-a Seminario pri Ĉinesko



Okaze de la 7-1 Ĉina Esperanto-Kongreso, je la 9-a de decembro, okazigis la 1-a Seminario pri Ĉinesko kun pli ol kvindek partoprenantoj el diversaj partoj de Ĉinio. Vejdo prezidis la Seminarion. Guozhu estis la ĉefa preleganto. Li, kun granda emocio, resumis atingojn akiritajn dum 33 jaroj en pionira kreado kaj tradukado de ĉineskaj poemoj. Laŭ la statistiko en lia prelego, ĉineskistoj jam elbakis 631 titolojn kun pli ol 1400 poemoj per 94 diversaj ĉineskaj skemoj dum 33 jaroj. Post lia prelego, oni okazigis la premieran ceremonion de kvin libroj pri ĉinesko: Ŝlosilo de Ĉinesko (Guozhu), Sekretaj Ĉineskoj (Lily), Ezopa Saĝo (Vejdo), 300 Sopir-al-Sudoj kaj Ĉineske (1973-2007.10.) (ĉiuj elŝuteblaj ĉe www.elerno.cn/elibroj.htm). La prelegon sekvis memvolaj paroladoj. Inter ili troviĝis konataj vizaĝoj de ĉineskistoj Even, Sceto, Li Weilun k.a. La seminario daŭris tri horojn en varma etoso.

Por marki ĉi tiun okazon, mi aranĝas ĉi tiun specialan numeron por ĉineskaj poemoj, kaj publikigas ĉi tie la prelegon titolitan “Nova Floro kun Ĉina Odoro” fare s-ro Guozhu. En ĉi tiu numero oni povas trovi la ĉineskajn poemoj verkitajn de konataj ĉineskistoj, kiuj pro ia kaŭzo silentis dum longa tempo, kaj kiuj persone deklamis siajn poemojn dediĉitajn al la speciala okazo en la seminario.

Vejdo

Guozhu

Al Penseo

—laŭ ĉinesko Proksimiĝas Bona Afero*

(2007-12-09)

**Jen speciala
ĉineska numero
de Penseo! Nova
rekord-apero.**

**Jubilu: "Proksimiĝas
bona afero!"
kaj gratulas ĝin al
plena prospero!**

**Haoshijin (Proksimiĝas Bona Afero): ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 56,65 / 75.65 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x=senrima)*

La Unua Seminario pri Ĉinesko

— laŭ ĉinesko Ĝoja Intervidiĝo

(2007-12-09)

**Solenejo hela
kaj bela.**

Kunsido sub flago verdstela.

**Kun koro,
adoro
fidela,
nova marŝo sub gvido cela.**

*Xiangjianhuan (Ĝoja Intervidiĝo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj respektive kun tri kaj kvar versoj de 6,3,9: / 3,3;3,9, laŭ rimaranĝo aaa, bb, aa



Ĉin(esk)oj Venas!

— laŭ ĉinesko Aromo Plenas en Korto
(2007-12-09)

Antaŭ pli ol
dudek jaroj,
aŭdiĝas ĝojkrio
de UEA
kun emocio:
Hura! Ĉinoj venas!
kun freŝa
energio.
Rekordo
fierinda
en historio.

Tio
aŭdiĝas
nun en nova
melodio:
Ĉineskoj venas
en gracio!
Pli belas ĝardeno
de verda
poezio.
Antaŭen!
Nin alvokas
nobla misio!

* Mantingfang (Aromo Plenas en Korto):
ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun versoj
de 446,45,634,345/ 2,344,54,634,345 silaboj,
kun rimaranĝo de xxa,xa,xxa,xxa / a, xxa, xa,

xxa,xxa (x=senrima).



Vejdo

Ĉinesko Prosperu!

—laŭ ĉinesko Manjianghong*

en ĝaden' de
verdujo
ĉineska flor'
el burĝon'
sane kreskas
post priesplor'
tridek-kvar-jara pena
kaj diligenta labor'
ni fine
vidas rikolton
jen en glor'

ĉinesko—
la trezor'
de parnas'
per valor'
kreas kulturon
de verka mor'
por ĝiaj disvolviĝo
kaj populara furor'
ni ĉiuj
kune klopo
kun fervor'

14-11-2007

*Manjianghong (Rivero Plenruĝa): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 11 versoj de 434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxa,xa,xxa / xa, xa, xa, xa, xxa (x=senrima)



Sero

Omaĝe al Ĉineskoj

—laŭ ĉinesko Caisangzi*

floro en Esperantuj'

brile bela

stil-modela

kresku per forto ŝvela

ĉineskistoj strebu kun

pen' abela

ir' alcela

al estonteco hela

*Caisangzi (Moruskolektanta Knabino): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun kvar versoj de 74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x = senrima)

Yanke

Sinceran Gratulon al Okazigo
de l' 1-a Seminario pri Ĉineskoj

—laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling*

poem'

poem'

ĉinstila — vera gem'

pompas kun fort-havo

post zorga pluv-lavo

vola

vola

al posed' popola

*Tiaoxiaoling (Flirta Kanto): ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el

palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.



Ardo

Ĉinesko, unu poetiko

—omaĝe al la unua seminario de ĉinesko

ĉinesko, unu poetiko,
fiksforma stilo de metriko,
versamatoroj ŝatas uzi
la formon verki kun muziko.

la unufoja romantiko
dronigis min en kor-liriko,
tentloge mi ekprovas versi
en la ĉineska versfabriko

ĉu pro kortuŝo aŭ paniko?
mi provas versi en praktiko,
kaj donas la kordankon al vi,
fondintoj de ĉineska prediko.

ĉinesko, unu poetiko,
fiksforma stilo kun metriko.

Avĉjo

En Songô

—laŭ ĉinesko Rumengling*

Rosojn sorbis pistil',
Rozon sorĉis pist-il',
diboĉi tranokte
Korpi fandiĝas sub vir'

Kor-tril'

Kor-tril'

Bis en sonĝa zefir'

**Rumengling (Kvazaŭsonge): ĉina fiksfirma poemo el sep versoj de 6,6,56,2,2*,6 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a,a,a (x=senrima). Interalie la kvina kaj sesa versoj estas la samaj.*

Hosemo

Belulino kaj Vino

—laŭ ĉinesko Sopir-al-Sudo*

Belulin',

Kiel dolĉa vin'.

Malfermiĝu mia sin'.

Tiom mi soifas vin.

Ĉu de am-destin'?

**Yijiangnan (Sopir-al-Sudo): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima)*



Lily

Ununokta Amorsperto

—laŭ ĉinesko Litingyan*

I.

**Mi ĉe flughaveno
stare kun ĉagreno
atendis amikinon
mian por alveno,
piedojn frapis
kun pensa malpleno.**

Okula promeno

**kaj homplena sceno
ja min maltrankviligis.
Kia in-azeno!
Esperon perdis
preskaŭ mi ĝis sveno.**

II.

**Ekkonsciis tuj mi
rigardon kun radi'.
Fortika alta viro
kun plena energi'
fikse rigardis
kvazaŭ en fantazi'.**

**Ŝajne sciis li pri
mia situaci'.
Signifoplene signis
al mi alveni li.
"Fraŭlin', ĉu vole
foriru kune ni?"**

III.

**Ĉe enir' de hotel'
lupe li kun kruel'
forĵetis min en liton.
Malgraŭ mia ribel'
peze premis min
kun kisada sigel'.**

**Li lekis ĉe l' orel'
spasme per korp-ŝancel'.
Mi jam kolapsis morte
dum la korpa duel'.
Nun mi konkludis,
ke li agas kun cel'.**

IV.

**Li nudigis per ŝir'
min kun peza elspir'.
Mi atendis senforte
nun l' atencon de l' vir'.
Lin senvestigis
li per hasta fuŝ-tir'.**

Je mia granda mir',
 belaspekta vampir'
 li montris sin antaŭ mi.
 Tiam mi kun sopir'
 male eĉ volis
 mi lin en seks-akir'.

V.

Jam nun mi sukplena
 por geĝu' festena
 pretis sen malobeem'.
 Jen la kac' promena
 ekfrotis tra mamoj
 kaj pubo senĝena.

Sen fortstreĉo pena,
 kac' je hor' envena
 ŝoviĝis en vaginon.
 Kuris sento svena
 tra mia spino
 je piŝtado bena.

VI.

Korpe konvulsie
 mi tordis ebrie
 sub la fremda fortikul'.
 Li agis manie
 kaj sekve haltis
 kiel agonie.

Mi sentis konscie
 ejakulon plie
 varmegan en vagino.
 Matene magie
 li jam senspure
 foriĝis glacie.

**Litingyan (Hirundo ĉe Kiosko): ĉina
 fiksfirma poemo el du strofoj po ses versoj de
 6,6,76,56 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,xa (x=
 senrima)*



Nuda Naĝado

—laŭ ĉinesko Yulinling*

I.

En laĝeto
 por nuda naĝ'
 laŭ la peto
 de mia amiko
 mi senvestis
 min je preto
 ŝoviĝi en akvon.
 Post vest-demeto
 mi saltis
 ne naĝejon
 per kapmalsupra ĵeto.

Mi naĝis kvaz' naveto
 facile
 en rond' ripeto.
 Mi sentis komforton
 kun mamoj
 en skueto
 flosentaj
 leve
 softe en kvieto
 kaj je pub'
 tikletadon
 sub akv-impeto.

II.

Nuda viro
 alnaĝis min
 kun aspiro
 li brakumis min de
 poste firme.
 Kun deliro
 li anhelis peze

por seks-akiro.

Korpglue

kun rigida

kaco per ir-reiro

li frotis kvaz' vampiro

sangvora.

Je granda miro

mi baraktis plenforte.

Feliĉe

per manŝiro

mi turniĝis

el li

ne kiel martiro.

Libere

mi fornaĝis

kun vesuspiro.

**Yulinling (Tintado en Pluvo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35, 634, 426,344 silaboj, laŭ rimaranĝo a, xa, xxa, xa, xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)*



Komencantino

Spektado al Maro

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Vent'

blovetas ĉe ĉi moment'

leĝere

kvazaŭ kun lament'.

Ond'

petolas en mara mond'

verŝajne

kiel vagabond'.

Sur

akvo ŝipoj en vetur'

skuiĝas

je onda plezur'.

Mev'

je ondaj mallev' kaj lev'

rondflugas

super ŝaŭma krev'.

Sun'

bakanta arde per brun'

koloras

naĝantojn de jun'.

Jen

intensiĝas venta pen'

subite

el mara eben'.

Nun

kvieto formortas kun

trankvilo

sub ondegaj pun'.

For

naĝantoj kun morna kor'

sin kaŝas

el mara rankor'.

Vel'

blanka ankaŭ en ventpel'

senspuras

el brua pelmel'.

Nub'

griza kvaz' malpura rub'

ŝutiĝas

de petola bub'.

Jam

la sun' kun malforta flam'

elfadas
el bilda ornam'.

Ĝu'
el spektad' nin je enu'
senigas.
Kun rava sent', ĉu?



Eto

Bezonata Akvo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

en
Saharo akva malplen'
sufokas
onin kun ĉagren'

sur
insul' kun bela natur'
aŭdiĝas
ne roĵa susur'

al
malriĉa loko kanal'
troviĝas
seka sen akvfal'

hom'
soifa kuŝe en dom'
eĉ ĝojas
ne je florarom'

brut'
kolapsas sen akva gut'
ne penas

por kampa servut'

ni
per ŝparad' de energi'
bonfaru
por viva soci'

**Shiliuziling* (Dekses-Silaboj): ĉina fiksfirma
poemo el kvar versoj de 1,7,35, laŭ rimarang'o
a,,a,xa (x=senrima)



Guozhu

Ovra Burĝono

(2007-12-09)

<Ovra Burĝono>, gem' de Sceto
subsorĉis en tirkest' Satana,*
ermite for de vid' ekrana
netrovebla en interreto.

Dek jarojn dronis en sekreto,
tentas ĉi erotik' arkana.

<Ovra Burgxono>, gem' de Sceto
subsorĉis en tirkest' Satana.

Dankon al vi, kara poeto,
versis kiel erupt' vulkana,
ĉineske pri amor' elana
sen ĉia katen' de hermeto.

<Ovra Burĝono>, gem' de Sceto!

* la dua verso estas citita el rondelo
<Rimgratulo al Sceto 60-jara>.



Guozhu:

NOVA FLORO KUN ĈINA ODORO

1. Poezio kiel animo de Esperanto

En la longa rivero de historio de artefaritaj lingvoj por universala uzo, la lingvo Esperanto, kiun ni lernas kun amo kaj adoro, viciĝis nek la unua, nek la lasta. Tamen ĝi ja estas la unika sukcesinto inter sennombraj rivaloj sam-kategoriaj dum jarcentoj. Ne senkaŭze do William Auld tiel komentis ke

"La lingvo Esperanto estas fenomeno unika : ĝi estas la sola arta lingvo en la historio de la mondo, kiu ekvivis kaj daŭre plifariĝis komuna lingvo de homoj el ĉiuj nacioj kaj ĉiuj mondpartoj, krea lingvo de poetoj kaj faka lingvo de sciencistoj, plenrajta komunikilo apud ĉiuj aliaj, laŭdire "naturaj", lingvoj."(1)

Fronte al la fakto ke el nuboj da projektoj de artefaritaj lingvoj sukcesis pluvivi nur tiel malmulta, kiel ĉina proverbo diris ke kalkulebla per niaj fingroj, D-ro Zamenhof iam diris trafe: "Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia."(2)

Laŭ lia opinio, projekto pri gramatiko kaj vortprovizo de la nova lingvo estas nur seka framo aŭ ŝelo, sen vivo, sen animo.

Por vivigi la sekan framon aŭ ŝelon, necesas literaturo, necesas verkoj, originalaj kaj tradukaj, kiuj kapablas fari la projekton vivanta korpo kun sango kaj karno. Dume poezio estas la plej valora gemo kaj perlo en literaturo, estas la animo por la lingvo.

Tial, dum la kreado de Esperanto, D-ro Zamenhof anticipe faris multajn eksperimentojn, li konsentis publikigi sian projekton nur ĝis la tempo kiam li povis versi en sia nova lingvo. Kiel konate, en 1878 D-ro

Zamenhof la unuan fojon publikigis sian pra-Esperanton, kiu poste estis forbruligita de lia patro, kaj la preskaŭ sola postrestaĵoj de tiu Lingve Universala estas la poemo "Malamikete de las nacjes". Kaj, en la Unua Libro de Esperanto jam legiĝis du poemoj originalaj, nome <Mia Penso> kaj <Ho, Mia Kor'>. Legiĝis samloke ankaŭ poemo de Heine <En nord' unu pino en solo> tradukita el la germana lingvo. Tial, el la supra fakto ni rajtas diri ke la poezio de Esperanto naskiĝis samtage kiel la lingvo Esperanto. La historio de la Esperanta poezio estas samaĝa kiel tiu de Esperanto. La karmemora Kalocsay ja tiel diris

Kaj vere, oni povas diri, ke ne per Esperanto li faris poezion, sed per la poezio li faris Esperanton. Oni povas diri, ke la tuta Esperanto estas poezia lingvo....

La ceteraj projektoj sonas apud ĝi, kvazaŭ matematika formulo apud soneto. (3)

Por Esperanto poezio estas tiel grava kiel animo.

2. Tri Beloj Harmonie en Poezio

La plej granda diferenco inter prozo kaj poezio kuŝas en ilia nesama formo. Poezio postulas la harmonian kombinon de tri beloj en ideo, sono kaj formo.

La tri beloj aludas respektive pri tri flankoj.

La tiel nomata belo de ideo aludas pri la ideo, penso, enhavo de la poemo;

la t.n. belo en sono aludas pri la muzika efiko pro metriko, ritmo, rimoj;

la t.n. belo en formo aludas pri la speciala

fiksa formo de la poemo, inkluzive nombrojn de strofoj, versoj, silaboj ĉu regulaj aŭ variaj laŭ certaj reguloj, kiuj naskis belon por rigardantoj.

Bona poemo posedas samtempe la suprediritajn tri belojn en harmonia kombino, plaĉajn al menso, oreloj kaj okuloj.

Poezioj en diversaj naciaj lingvoj, kvankam kun fono de malsamaj kulturoj, tamen same postulas pri la tri beloj en poemoj, el kiuj la postulo pri beloj de ideo kaj sono estas komuna, dum tiu pri belo en formo estas plej aparta karakterizaĵo, kiu plej forte esprimas la malsamajn stilojn kaj ekzotikajn ĉarmojn de diversaj nacioj.

3. Pionire eniras fiksfarmaj poemoj el la Okcidento

En sia evoluo, la Esperanta poezio nutris sin per kremo el diversaj naciaj kulturoj sorbante ties avantaĝojn kaj kvintesencojn kaj dum cent jaroj elvartis grandan ĝardenon kie prospere kaj pompe disfloras centoj da floroj konkursante per allogaj beloj. Aperis generacioj da eminentaj poetoj kun okulfrapaj bonaj poemoj.

Fama erudito G. Waringhien iam skribis ke "unu --- eble la precipa--- rolo de la esperanta literaturo estas fariĝi kvazaŭ la muzeo de ĉiuj naciaj ĉefverkoj."(4) Legiĝis ne malmultaj poemoj en normalaj fiksfarmaj formoj jam delonge popularaj en naciaj lingvoj. Ni rimarkas ke poetoj el la Okcidento ja iris pionire tiufanke. Ili sukcese transplantis multajn fiksfarmajn poemojn el la elstara heredaĵo de siaj propraj nacioj ke tiuj enradikiĝis, ekfloris kaj abunde fruktdonis.

Ekz-e tercino el la itala poezio, uzita de la granda poeto Dante por verki sian Dian Komedion;

humura limeriko el la angla poezio;

soneto kiu ĝermis el la itala kaj poste furoris tra la tuta Eŭropo, granda Ŝekspiro versis tutan poemaron en ĝi;

rondelo el la franca, kun ripetaj suspiroj; trioletto, bela kaj petola.

Esperantaj poetoj versante per tiuj fiksfarmoj jam atingis tiel maturan lertecon tute laŭ sia deziro.

Kaj la famaj Esperanto-tradukoj de multaj mondfamaj verkoj, kiel supremenciitaj La Dia Komedio de Dante kaj La Sonetoj de Ŝekspiro, ankaŭ estas fidele redonitaj en la samaj formoj kiel en la originaloj.

Pri tiu gemoj el la diversaj naciaj poezioj majstro G. Waringhien intime nomis ilin "familiaj juveloj" (5) jam delonge sen fremdaj postsignoj.

4. Ne mankis postsekvantoj el la Oriento

Kaj ni rimarkas ke post la pioniroj de la Okcidenta, ne mankis postsekvantoj el la Orienta poezio.

4.1 Japana

Esperanto eniris Japanion kaj Ĉinion preskaŭ samtempe je la komenco de la 20-a jc. Esperanto-movado en Japanio akiris okulfrapajn atingojn, inkluzive ankaŭ la sukcesan enkondukon de japaneskoj en Esperantan poezion. Versoj en japanesko ĉefe estas el du specoj: kvin-silaba kaj sep-silaba. Malsamaj kombinoj de ili donis al ni hajkon, tankaon kaj utaon. Ne nur japanaj esperantistoj, sed ankaŭ alilandaj poetoj versis laŭ tiuj fiksfarmoj. Abunde da japaneskoj ni povas legi en poemaroj kia Eterna Bukedo, Tutmonda Sonoro kaj la monumenta Esperanta Antologio.

4.2 Persa

Aperis en Esperanto ankaŭ robajo, fiksfarma poemo el persa poezio. Eĉ ekzistas du famaj tradukoj de Robajoj de Omar Kajam en Esperanto dank' al Auld kaj Waringhien, esp-igitaj respektive el la angla kaj el la persa lingvoj. Robajo karakterizis plej okulfrape per la rimaranĝa maniero kaj tiu rimaranĝo efikis por ĉinoj tiel ke oni tuj memoris pri la

verskvaroj, ĉu kvinsilaba aŭ sepsilaba, en Tang-poemoj de Ĉinio.

5. Ekapero de la unua ĉinesko

Se alilandaj fiksoformaj poemoj, ĉu el la Okcidento aŭ el la Oriento, ĉiuj povis senprobleme eniri Esperanton kaj fariĝis "familiaj juveloj" en la esperanta poezio, sed kial oni ankoraŭ vidis nenian pecon de la fiksoformaj poemoj el Ĉinio? Ĉu tiu manko ne estas tro okulpika kaj sentebla?

La unua ĉina esp-isto kiu rimarkis pri tiu ĉi manko kaj ekprovis ŝtopi la vakantan blankon estis Hu Guozhu (1938-). En la komenco de la 70-aj jaroj de la 20-a jc li ekversis en Esperanto laŭ ĉina fiksoformo Sopir-al-Sudo 17 poemojn kiel la unuajn ekzercojn de la eksperimento. Ĉar siatempe en Ĉinio regis ŝtormo de la tiel nomata Granda Kultura Revolucio, li ne kuraĝis versi pri sia propra sento, do provis nur per la reversigo de famaj poemoj de antikvaj ĉinaj poetoj.

En junio de 1973, aperis en la n-ro 2 de la mimeografita revuo El Ĉinaj Esperantistoj (EĈE) 4 poemoj de Guozhu laŭ ĉina fiksoformo Sopir-al-Sudo, kies enhavo respektive estis pri 1)ĉarma luno, 2)flava papilio, 3)hirundoj, 4)ostard'. Tiuj poemoj estis senprecedencaj en la esp-a poezio, ĉar ili estis versitaj laŭ reguloj de ĉina fiksoforma poemo Sopir-al-Sudo, havante komunan formon je mezuro, nombroj de versoj, silaboj, rimoj kaj rimaranĝo .

Poste, aliaj du poemoj Sopir-al-Sudo aperis kiel specimeno de ĉinesko en la libro Esperanta Metriko, respektive kun vira kaj ina rimoj (6):

1
Ĉu fajro
sovaĝa povas
forleki herbojn ? Ho ne !
Jen vent' printempa blovas,
Kaj herb' jam novas.

2.

En pluvet'
Dorse sur azen'
Veturante la poet'
Lulis sin per rava tem'
Taŭga por poem'.

Ĉar El Ĉinaj Esperantistoj (EĈE) estas unu el la nemultaj mimeografitaj revuoj aperintaj en la jaroj de la Granda Kultura Revolucio en la ĉina Esp-movado, dume la Esperanta Metriko estas ĝis nun ankoraŭ la unika gvidlibro tiuteme en la ĉina por ĉinaj esp-istoj, do ili akiris konsekvence atenton de ĉinaj esp-istoj. Pli kaj pli multiĝis ĉinaj s-anoj kiuj zorgis pri la enkonduko de ĉinaj fiksoformaj poemoj en Esperanton. Tamen, siatempe ankoraŭ neniu ekster Ĉinio sciis pri tiu evento.

6. Alvoko de Sudafrika Poeto

Fakte <Sopir-al-Sudo> ne estis la unika inter ĉinaj fiksoformaj poemoj. Nombro de ĉinaj fiksoformaj poemoj estis tiel abunda ke ĝi eĉ superis 2000. La sukcesa eniro de <Sopir-al-Sudo> en Esperantan poezion aludas al ni atendeblan perspektivon: se tiu ĉi sukcesis la unua, teorie do la aliaj pli ol 2000 kamaradoj-skemoj de ĉinaj fiksoformaj poemoj ankaŭ havas la saman egal-raĵton kaj eblecon eniri Esperantan poezion kiel sekvantoj. Kaj, se pli ol unu ĉina fiksoforma skemo eniris Esperantan poezion, ili devas havi komunan kaj pli vaste uzatan nomon, kiu, laŭ regulo de vortfarado en Esperanto, devas esti ĉinesko.

Estas interesa fakto, ke tiu, kiu unuafoje uzis la nomon ĉinesko, ne estis ĉina esperantisto, sed alia neĉina fama Esperantisto-poeto Edwin de Kock(1930-) el Suda Afriko. La 14-an de novembro 1983, Edwin de Kock versis poemon, kies ĉefa titolo legiĝas ĝuste Ĉinesko; samtempe kun vic-titolo <imite de HSU Kan>. La poemo aperis en lia poemaro <Saluton al la Suno>:

De kiam vi, sinjor , foriris,

lantnube trajtigis vizaĝoj;
 kaj flirtas, oldaj kvazaŭ koro,
 komodspegule albumpaĝoj.(7)

Guozhu danke faris por ĝi ĉinigon.

Edwin de Kock aldonis al sia ĉi poemo piednoton: "HSU Kan (171-218). 'De kiam vi, sinjor', foriris' estas el lia poemo pri la pensoj de edzino — verso ofte imititaj. Nin influu, post la grandaj Japanoj, nun ankaŭ la grandaj Ĉinoj!"(8)

Jen varmaj voko kaj alvoko, kun aspiro ke ĉinesko aperu sur la internacian scenejon de Esperanta poezio.

La varma alvoko far Edwin de Kock vere kortuŝas. Tamen li ne estas ĉino, sen scipovo de ĉina lingvo kaj, kaŭze de tio, eĉ prenis na "De kiam vi, sinjor', foriris" reprezentanto. Tio estas miskompreno.

"De kiam vi, sinjor', foriris" estas malnova temo de yuefu-arioj. Tiu titolo devenis el la versoj en la poemo <Buduaru Sopiro> de Xu Gan (t.e. HSU Kan sub plumo de Edwin de Kock). Xu Gan, alinomata Xu Weichang, lokano de Beihai (nuna Shouguang de Shandong-provinco), estis unuela poeto de Sepopo en Jian'an-erao(196-220 p.K.). Kvar poemoj liaj restis ĝis hodiaŭ. La poemo <Buduaru Sopiro> skribas pri la sopiro de edzino en hejmo pri la fora edzino. Originale tiu poemo havas 60 versojn, sed i.a. la kvar versoj "De kiam vi, sinjor', foriris" estis precipe ŝatata de legantoj kaj multaj en sekvantaj dinastioj eĉ imite faris kvinsilaban verskvaron. La imitaĵoj ne nur uzis la saman titolon, sed ankaŭ la versmanieron kiel Xu Gan, kun sama teksto en la unua verso, sama duono en la tria verso kaj tiel fariĝis formulo de poemo "De kiam vi, sinjor', foriris". Tamen per tio ĝi ankoraŭ ne sufiĉas por esti la reprezentanto de ĉina poezio.

Formoj de ĉina poezio estis tre variaj: la kvarsilabaj en la <Libro de Poezio>, la specifaj en la <Lisao>, la kvinsilabaj kaj

sepsilabaj verskvaro kaj versoko, egalsilabaj, buntsilabaj kaj la plej diversaj en ci-oj kaj arioj... travivinte evoluadon de jarmiloj. Laŭ <Imperie Oficiala Fiksformaro de Ci-o> eldonita en Qing-dinastio(1644-1911), estis resume 2306 skemoj por ci-oj, kaj 581 por arioj, el kiuj la plej ofte uzataj nombriĝas ĉ. 50, kiuj ja meritas nian en-esperantigon. La supredirita enkonduko de <Sopir-al-Sudo> en Esperantan poezion fakte estis nur eka ero de la granda projekto Ĉinesko.

7. Al la mondo ekster Ĉinio

Por ke ĉinesko vere alradikiĝos en Esperanton, ne sufiĉas la sola sukceso de <Sopir-al Sudo>. Necesas pli multe da solidaj laboroj far multaj homoj, kaj ĉinaj esperantistoj devkonscie faris por plenumi la historian mision.

Ĉiu komenco estas malfacila. Tia ankaŭ estis la komenca, la primitiva, periodo de ĉinesko.

Tamen, ĝuste kiel nia Majstro D-ro Zamenhof versis:

Malfacileco, malrapideco
 Al ni la vojon ne baros.
 Sen malhonora malkuraĝeco
 Ni kion povos, ni faros.

Tiu komenca periodo de ĉinesko daŭris 33 jarojn.

Ni ĝin kondukos neripozante,
 Kaj nin lacigos nenio.

Unu post aliaj malfaciloj estis konkeritaj.

Unu post aliaj novaj ĉineskaj skemoj estis enkondukitaj en Esperanton.

Unu post aliaj spertoj akiritaj en ĉinesko-versada praktiko estis resumitaj, rafinitaj kiel teorio.

Kaj ĉinesko de tute senfama situacio ankaŭ fariĝis iom post iom konata en Esperantujo.

Interalie la plej gravaj eventoj koncernis kun inaŭguro de Penseo (1990-) kaj fondiĝo de la ĉineska rubriko en interreto (2006-).

En julio de 1990, inaŭguriĝis beletra monata revuo Penseo en Ĉinio. Tiu revuo, kun tre banala aspekto kaj limigita amplekso de

nur kvar paĝoj ĉiunumere, povis esti distribuata al fremdaj landoj nur en koverto kiel ordinara letero. Tamen, per siaj agmaniero, spirito, kvalito, honesto, kaj precipe per la ĉinaj trajtoj, rapide gajnis bonan renomon ĉe legantoj, kaj estis honorigita en 1994 per Grabowski-premio. En iu eseo William Auld komentis ĝin kiel unu el la dek plej gravaj literaturaj revuoj en centjara EM. Ekde sia unua numero, Penseo fondis specialan rubrikon por ĉinesko kaj persiste publikigis (ĝis hodiaŭ) ĉineskojn. Tiel la revuo Penseo fariĝis grava kanalo por ke ĉineskoj iru al la mondo.

Ĝis la jarfino de 1997, en la unuaj sep jaroj Penseo jam publikigis 120 ĉineskojn. Ekster ĉies atendo, la plej uzata skemo tamen estis la ĉinesko Tiaoxiaoling (Flirta Kanto) kun rigora postulo pri palindromo! Leginte la kvar ĉineskojn Tiaoxiaoling en la unua numero de Penseo, William Auld ne povis sin deteni de emociiĝo kaj tuj skribis jene:

"Aparte mirigas la poemformo tiaoxiaoling, kun ties kvar elstare sukcesaj ekzemploj. Kiel la poetoj ŝatas turmenti sin, ligante sin per ĉiam pli striktaj katenoj! Mi ne konas pli rigoran formon ol tiaoxiaoling! Gratulon vere sinceran al Guozhu kaj Lu Jixin."(9)

La revuo ekster Ĉinio, kiu plej frue publikigis ĉineskojn, estis <Preludo> en Japanio (10). En sia novembra n-ro de 1989, <Preludo> publikigis serion da ĉineskoj de Guozhu je funebro pri Honfan, la veterana pioniro de ĉina EM. Poste, ĉineskoj aperis ankaŭ en aliaj revuoj ekster Ĉinio, ekz-e en <IPR>, la organo de ILEI (11), la prestiĝa <Heroldo de Esperanto>, kaj influhava beletra revuo <Fonto> kc. (12)

En 1991, Lu Jixin verkis bruŝuron <Invit' al Ĉinesko>, kiu ne povis trovi eldonejon en Ĉinio. Feliĉe ĝi ricevis favoran akcepton de Gerrit Berveling, kiu eldonis ĝin 1995 en Breda, Nederlando, kiel la n-ron 13 inter la VoKo-serio (13). Tiu ĉi 28-paĝa broŝuro

kolektis 7 ĉineskojn "Tiaoxiaoling", "Dekses-silabo" kc. kun 75 specimenoj versitaj de la aŭtoro, tial ĝi legiĝas ankaŭ kiel individua poemaro de Lu.

Leginte ĉineskojn, la granda poeto William Auld estis tiel entuziasmigita ke li verkis favoran recenzon <Ekjuku la poeta mano> kaj esprimis sian bondeziron ke : "Mi esperas, ke la tria eldono de Esperanta Antologio enhavu originalajn Ci-ojn ankaŭ de poetoj ne-ĉinaj." (14)(Fonto 175, p.29)

Estas ĝojinde ke neĉinaj esperantistoj vere komencis versi laŭ ĉineskoj. Kvankam ne multe, tamen kun grava signifo. La plej fruaj du aŭtoroj estis Kris Long kaj Meva Maron. Penseo publikigis tri ĉineskojn "Tiaoxiaoling" de ili, nome: Polucio (de Kris Long, la unuaj du sube) kaj Blankaj Buloj (de Meva Maron, la tria sube) (15).

Ŝtona, ŝtona
strand' Brajton-betona:
rubo, ne marstelo,
ladskatol', botelo
...lote, lote
glutas gorĝ' pilote

vastan,vastan
marsurfacon plastan!
Polietilena
sako, pako ĝena;
naĝe, naĝe
sen kuraĝ', enkaĝe.

Perloj! Perloj:
neĝborulaj ferioj.
Jam galantjargone,
dafodiburĝone:
neĝo, neĝo
for post glorsieĝo.

8. Novaj rekordoj en Interreto

21-a jarcento bonvenigas la epokon de Interreto. La 17-an de novembro 2006,

fondiĝis rubriko Ĉinesko en la hejmpaĝo de ĉina forumo de eLerno. La rubriko servas kiel bazloko kaj scenejo, kie aperas grupo da novaj aŭtoroj kun centoj da novaj ĉineskoj, markante ke ĉinesko eniras novan periodon de sia evoluado.

Agado en interreto karakterizas per publikaj mesaĝoj kaj maskitaj aŭtoroj. Unuflanke, la mesaĝoj publikiĝis akurate kaj travideble; aliflanke, la novaj aŭtoroj preskaŭ ĉiuj kaŝis sin sub masko de plej diversaj kapricaj pseŭdonimoj. Ekz-e, spertulo eble memtitolas per "komencantino", aŭ vira ŝajnigis sin virina. Pro tia arbitra kaŝnomado, ni bedaŭrinde nun scipovus preskaŭ nenion pri la vivo de la maskitaj aŭtoroj, tamen, dank' al tio, la aŭtoroj povas libere kaj senskrupule versi pri ĉia temo, inkluzive senprude pri erotika (rigardata kiel tabua dum multaj jaroj).

Novaj ĉineskoj kreskas kun tagoj, horoj, aŭ minutoj en la reto. Kun emocio mi Guozhu postsekvis, kolektis, numeris, komentis. Ĉiufoje, kiam mi kolektis 100 titolojn, mi aperigis la liston laŭtempe kolektitan. Kaj Vejda, la estro de la hejmpaĝo eLerno, akurate eldonis reten unu volumon da eLibro (elektronika libro), kun ĉineskoj laŭskeme vicigitaj. En daŭro de unu jaro, ĝis la 31-a de oktobro de 2007, eLerno jam sinsekve eldonis ses tiajn eLibrojn <Ĉineske> (de Volumo I ĝis Volumo VI), kiuj enhavis pli ol 1400 ĉineskojn sub 631 titoloj, t.n. jam delonge superis la mejloŝtonan rondan nombron 300 (16).

Tiuj ĉineskoj estas kun ĝojinda bunteco kaj en la poema formo kaj en la enhavo. Ili verŝajne ekspozis al la publiko la fakton ke ĉinesko senĉese evoluas al maturiĝo kaj kapablas esprimi diversajn flankojn de la vivo.

8.1. Libera kaj rapida versado pri la reala vivo Bai Juyi(772-846), la granda poeto en Tang-dinastio, iam emfazis: "Verku artikolon

por la epoko, kaj versu poemojn pro eventvoko." Por-okazaj improvizaĵoj plej facile esprimas la talenton de poetoj.

Temoj de tiuj novaj ĉineskoj estas tre ampleksaj: kaj pri la socia vivo, kaj pri la aktivadoj de esperantistoj, multaj el ili kun urĝa templimo. Ekz-e, temante pri festoj aŭ memortagoj estas jenaj ĉineskoj:

Jarfine (ardo, § .236), Adiaŭ al 2006 (Komencantino § .289), Renkonte al la nova jaro (Komencantino, § .286; Vejda § .209), Zamenhof-festo(eto, § .197), 90-a Datreveno de forpaso de D-ro Zamenhof (eto § .459), Majnua Tago (eto, § .466), Tago de Patrino(Niuniu, § .475), Tago de Infanoj (eto, § .531), ... ktp. Tiuj ĉineskoj versiĝis akurate kaj trafe, respegulante la amon de la aŭtoroj pri la vivo kaj ilian lertecon en versado.

8.2. Ĉina formo, ĉina enhavo

Sub ĉineska formo pri ĉina enhavo. Ekz-e Sam (2007-3-8)

Nokta Penso

— laŭ ĉinesko Sopir-al-Sudo

plenluno/ prujneske brilas/ kapleve mi ĝin spektas/ mi al hejmlok' sopiras/ vagpenso iras.

Ĉinoj facile rekonas de tiu ĉinesko la faman poemon "Penso en kvieta nokto" de Li Bai. (17)

8.3. Ĉina formo, okcidenta enhavo

Sub ĉineska formo pri okcidenta enhavo. Ekz-e

Sam (2007-1-16)

Acidaj Vinberoj

— laŭ ĉinesko Daoliansi

vinberoj/ alt-pendas/ vulpon pike turmentas/ ĝi ating-saltas vane/ "acidaj!" ĝi lamentas.

Legantoj facile rekonas la faman fablon de Ezopo (18), sed nun jam sub tipe ĉina vesto.

8.4. Samforme esp-igi

Per ĉinesko por traduki (esperantigi) ĉinajn poemojn. Ekz-e

Zhuang Qixiong (2007-02-24)

Sendormeco 捣练子 [33,7,77]

— laŭ ĉinesko Daolianzi

En korto/ de silent' ./ senĉese blovas frid-vent' ./ Ne povas dormi dum nokt' ./ nur pro sonorila pent' ?

Ĉinoj facile rekonas de tiu ĉinesko la faman poemon de Li Yu(937-978), en ekzakte sama formo. (19)

8.5. Samforme ĉinigi

Traduki el Esperanta originalo en nacian lingvon, tio montras la maturecon de Esperanta beletraĵo kaj levas prestiĝon de ĉinesko.

Guozhu sukcese faris serion da tiaj ĉinigoj de ŝatataj originalaj ĉineskoj. Ekz-e por la serio Genezo de Lily.

8.6. erotika serio de Lily

Sub pseŭdonimo lily, iu (eble ĉiam maske) versis serion da erotikaj ĉineskoj, senprudaj kaj senkliŝaj, kies nombro jam superis 60. Ekz-e

lily (2007-1-17 § .405)

Trilogio de Litludo

—laŭ ĉinesko Shiliuziling (Dekses-silabo)

Ĝu' / per langmordet' kaj korpglu' / karese/ ĝis sukplenas tru'

Ĝem' / lin ekscitas kun sent-trem' / al bor-mov' / ĝoja al ekstrem'

Kri' / pro forta piŝtad' en ŝi/ diboĉe/ rava iluzi'

9. Diligenta kultivado

La marŝado de Ĉinesko komenciĝis ekde 1973 kaj daŭriĝis ĝis hodiaŭ. Ĉinaj esperantistoj ĉiam persisteme kaj diligente laboras en nia verda kultivejo, antaŭen marŝas per nerapidaj sed firmaj paŝoj. En lastaj jaroj gajnis novajn fruktojn.

9.1. Pli kompletigita la teorio

En la jaroj 1988~1991, Guozhu faris primaran resumon pri la teorio de ĉineskoj:

1) fari difinon pri ĉinesko: esperanta poemo, verkita laŭ skemo de ĉina fikforma poemo (ĉefe laŭ ci-oj sed inkluzive ankaŭ ekz-e de: poemoj, arioj, kaj eĉ tiuj de naciminoritataj poezioj), estas nomata ĉinesko. Akademian nomon de ĉinesko estu skribita per Hanlingva Fonetika Alfabeto (HFA). Ellabori la signojn por noti skemojn de ĉineskoj.

2) fari normon laŭ silab-nombroj por difini pri la mallongaj ĉineskoj (<58 silaboj) /mezlongaj ĉineskoj (59~90 silaboj) /longaj ĉineskoj (>91 silaboj) .

3) elekti 81 skemojn prioritatajn, kies specimenoj sinsekve aperas en Penseo.

4) difini la principon, ke, estas permesate uzi serion da ĉineskoj por skribi pri longa enhavo.

5) ellabori la kompletigitan eldonon de la il-libro <Ŝlosilo de Ĉineskoj> kun 82 ĉineskaj skemoj kaj enretigi ĝian elektronikan eldonon.(20)

9.2. Aperas novaj aŭtoroj

9.2.1

La nunaj aŭtoroj, kompare al tiuj en la unua periodo, estas grandparte nesamaj.

En la unua periodo (1973 - 2005) aŭtoroj de ĉineskoj ĉefe estas Hu Guozhu el Hubei, Lu Jixin el Guang'xi, Shi Chengtai (Sceto) el Heilongjian, Mao Zifu el Hunan, Even (Hosemo) el Hainan, Chen baode(Zepto) el la Interna Mongolio, Li Weilun el Pekino, Teng Xuexun el Shandong.....k.c. el kiuj plejparto jam silentis dum longa tempo.

La nunaj novaj aŭtoroj aktive agas ĉefe en la rubriko de ĉinesko en interreto. Tiuj, kiuj aktivis en lastaj monatoj, estas (laŭ alfabeto vicordo):

ardo, Bonkoro, eto, komencantino, lily, Niuniu, sam, sero, Vejda, Zhuang Qixiong....Tiuj

novaj aŭtoroj karakteriĝis per alta startpunkto. Kvankam estas novico de ĉineskoj, tamen ne estas nov-bakitaj esperantistoj. Malgraŭ ke ŝi nomas sin Komencantino, vi nepre ne kredu ŝin komencanta kursanino. Rilate al Vejda, oni havas la impreson: Ja vera eksperto!

9.2.2 Ĉineske reciproki

La premiso por okazi reciproka interŝanĝo de ĉineskoj estas ekzisti pluraj poetoj. La okazo de tia interŝanĝo signifas ke jam estas grupo da poetoj. Ekz-e, en la 5-a de junio 2007, la poetino Komencantino post tri monatoj da penado sukcese plenumis la taskon ĉieskigi la tutan poemaron <Ezopa Saĝo>. Guozhu kaj ardo, lily publikigis rete rimgratulojn, kaj Komencantino ankaŭ eĥe respondis akurate. Iliaj mesaĝoj legiĝis kiel

§ .548 Guozhu 2007-06-05 23:02:50

Al Kara Komencantino (Busuanzi) (21)

§ .549 ardo 2007-6-6 0:29:37

Omaĝe al komencantino (Busuanzi) (22)

§ .551 lily 2007-6-7 10:32:07

Persistemo de Virino (Tiaoxiaoling) (23)

§ .550 Komencantino 2007-6-6 20:28:35

Valora Kuraĝigo (Busuanzi) (24)

9.3. Pli multaj skemoj uzataj en praktiko

Kape de la rubriko de ĉinesko en la Forumo de eLerno estis metita <Konciza Skemaro de Ĉineskoj> kun specimenoj de 81 ĉineskoj je dispono de verkantoj. Sed tiu skemaro neniam malpermesas al oni uzi aliajn skemojn. Fakte en lastaj monatoj, aŭtoroj de ĉineskoj uzis multe pli ol tiom en la skemaro, ekz-e "taichangyin, tianjingsha, putianyue" kiujn ili uzis, ne troviĝis en la skemaro. Kaj kelkaj aŭtoroj uzis "dek ling-ojn" aŭ "dek zi-ojn", tio ja ankoraŭ pli multe superis la skemaron.

9.4. Pli libera kaj lerta uzado de serioj da ĉineskoj

Kiam la mezuro de mallonga ĉinesko ne sufiĉas por esprimi pli vastan enhavon, poetoj

rajtas uzi pli ol unu skemon, tio jam okazis precedence en antikva poezio, kaj nun same okazis en versado de ĉineskoj.

Estas du kategorioj de serioj: pluraj malsamaj skemoj mikse uzitaj en unu serio, kaj ripeta uzado de unu sama ĉinesko.

9.4.1. En aŭgusto de 1989, Guozhu verkis "Rimgratulon al Sceto" el 225 versoj en 30 pecoj, la 24 skemoj konsistis el 17 ĉinaj kaj 7 fremdaj. Tio donis ekzemplon de eblecon por libera kaj miksa uzo de ĉineskoj.

9.4.2.

Kiam eto versis pri "Malsaĝa Avo" (§ .278), li nur uzis dufoje la saman ĉineskon Manjianghong.

Sed kiam lily versis pri "Adamo kaj Eva" (§ .200), ŝi jam uzis ok malsamajn ĉineskojn Busuanzi, Dielanhua, Litingyan, Haoshijin, Fengrusong, Dianjiangchun, Shiliuziling, kaj Yexingchuan.

Dume, kiam Vejda versis pri ĉina mito "Bov-paŝtisto kaj Feino" (§ .259), li uzis dek malsamajn ĉineskojn Qingyu ' an, Renyueyuan, Litingyan, Yujiexing, Yongyuyue, Yulingling, Shengshengman, Niannujiao, Queqiaoxian, Shanhuazi.

Zhuang Qixiong liveris al ni alian serion, aparte freŝan. La unua serio, el dek ĉineskoj, kies nomoj ĉiuj finiĝas per "zi": Nangezi, Nanxiangzi, Yugezi, Daolianzi, Ganzhouzi, Tianxianzi, Jiangchengzi, Hemanzi, Caisangzi, Xing-xiangzi.

Kaj la dua serio, el dek ĉineskoj, kies nomoj ĉiuj finiĝas per "ling": Shiliuziling, Fengdieling, Dujiaoling, Tiaoxiaoling, Rumengling, Mulanhualing, Qingpingyueling, Jiangyueling, Liuchunling, Tangduoling.

Tiuj ekzemploj montras al ni la eblecon ke aŭtoroj povas libere fari laŭdeziran grupigon de malsamaj ĉineskoj.

9.4.3. Novaj rekordoj de ripeta uzado de unu

sama ĉinesko
Ekz-e, la 4-an de marto 2007, lily kreis la rekordon versi per 30 ĉineskoj <Sopir-al-Sudo> pri <Rememoro pri Seksatenciteco> (§ .411), sed la 19-an de marto 2007 Komencantino jam renovigis la rekordon per 36 <Jiangnanchun>-oj por ĉineskigi la ezopan fablon <La Cerbo> (§ .435.). Pli poste Komencantino eĉ kreis la pli novan rekordon versi 177 ĉineskojn <Sopir-al-Sudo> pri Ezopo. En tiaj aplikadoj la "transiro" estis uzata ĝis senprecedenca nivelo. Tio estas kontribuo far ĉinaj esperantistoj al la esperanta poezio.

9.5. Erotikaj ĉineskoj

Dum longa tempo erotika temo estis rigardata kiel tabua ĉe ni. En 70 jaroj de post kiam furoris la fama libro <Sekretaj Sonetoj> (1932-), ĉina Esperantujo ŝajnis sin blinda aŭ muta antaŭ tiu majstra verko. Tia hipokrita konduto estis rompita nur en 2002, kiam Guozhu verkis eseon <NEFORGESEBLA MIRPOEMARO — memore al la 70-jariĝo de la Sekretaj Sonetoj> (25) . Nature, tia pseŭdpruda silentado estis nenormala, kaŭzita de nenormala cirkonstanco. Feliĉe, Ĉinio praktikis prudentan politikon de reformado kaj malfermo, kaj tia nenormala rutino estas forigita. Kaj ŝanĝoj okazis en versado pri erotika temo.

9.5.1 De sekreta ĝis publika

En ĉina Esperantujo, la poeto, kiu plej frue aŭdacis versi pri erotika temo, estis s-ano Shi Chengtai. En decembro de 1994, li verkis poemaron <Ovra Burĝono> el 21 ĉineskoj en 7 malsamaj skemoj, kiu koloris kaj forme kaj enhave ambaŭ kun tipe naciaj trajtoj. La poemaro de Shi estis ilustrita per erotikaj bildoj kolektitaj de Robert H. Van Gulik (1910-1967) , fama nederlanda ĉinologo, do aspektas kiel <Sekretaj Ĉineskoj> el oriento, certgrade analoga al la fama <Sekretaj

Sonetoj>. Bedaŭrinde tiu poemaro ĝis nun ankoraŭ kuŝas en tirkesto de Shi, sen ŝanco por publikiĝi. Jen du pecoj la 15-a <Linjiang-xian> kaj la 16-a <Langtaosha>:

XV

Strebo senintermita,
harara kareso,
hasta langa komplezo.
Gustumsufiĉo,
ŝpruca frenezo.

Jasp-pieda svingado,
ovra silo-mezo,
nektara roj-eksceso;
delekta pisto,
puŝad' sen ĉeso...

XVI

Amor-elano !
Ge' en bano;
en pasi-oceano,
kiel anasoj buntaj
— ek ! en dramo !

Erot-vulgano:
vanga flamo;
sieĝata jadkano,
murmure en vag -ino...
Fe-nirvano !

9.5.2. De malmulta al plimulta

La poemaro <Ovra Burĝono> de Shi Chengtai enhavas 21 ĉineskojn.

Sed hodiaŭ en la serio da erotikaj ĉineskoj de lily en interreto jam aperis pli ol 60, kaj tiu nombro eĉ nun ankoraŭ kreskas.

9.5.3. De nur Esperanta ĝis dulingva Esperanta-ĉina

La originalaj esperantaj ĉineskoj estis tradukitaj (far Guozhu) en la ĉinan. Ekz-e:

lily (2007-4-12), Kampa Geiĝo (Tiaoxiaoling)

调笑令 春野// rava, rava 清狂, 清狂, /
junulino brava 新潮开放女郎。/ kuŝas por
amoro 随心就地卧躺, /sur herbej' kun floro
草地野花金黄。/ oro, oro 黄金, 黄金, / de
ama angoro 撩乱一片春心。

[se oni ne povas presi aŭ legi la ĉinajn
ideogramojn, legu nur la Esperantan
originalon. noto de GZ]

9.6 Akurata eldono de elektronikaj libroj (elibroj) de ĉineskoj

Marŝante kun la progreso de epoko, ĉinaj
esperantistoj per elibroj rompis la mortigan
baron de "altprezaj libro-numero, prespago kaj
poŝtpago" al esperantaj eldonaĵoj, rapide kaj
akurate prezentis al la publiko la fruktojn de
kolektiva klopodo far multaj homoj dum
multaj jaroj, tiel ke esperantistaj legantoj de
ajna loko nun ĉiuj povas, pere de interreto,
kune ĝui ilin. Ni vidas ke ĉineskoj nun
aperantaj en interreto nature grupiĝas en
diversaj temoj, kaj multaj serioj de multaj
aŭtoroj ja indas eldoni (almenaŭ en elibroj).

10 Nefinita finalo

De "Ĉinoj (re)venas" ĝis "Ĉineskoj venas"!

Dum longa jardeko de la t.n. "Granda Kultura
Revolucio" de Ĉinio (1966-1976), la
internacia Esperantujo trovis nenian informon
de ĉina E-movado. Tial, okazis sensacie
kvazaŭ printempa tondro la evento en februaro
de 1979, ke sur la tuta kovrilo de Esperanto, la
organo de UEA, aperis serio da fotoj el ĉina
E-movado, de estimata Tikos, la torĉtenanto
de ĉina E-movado, de ĉinaj esperantistoj en
Uhana Kolokvo (UK) k.a.. La redaktoro
aldonis titolon kun jubila hurao ke "Ĉinoj
(re)venas!"

Dum longa tempo post kiam aperis la
monumenta Esperanta Antologio (unua eldono
en 1958, dua eldono en 1984) ĝis nun ankoraŭ
neniu ĉinesko aperis tie inter vicoj de la
familiaj juveloj de Esperanta poezio. William
Auld esprimis sian favoran atenton pri tio, ĉar
sen Ĉinio la nuna mondo vidiĝas nekompleta.

Nun ni povas ĝoje informi al la estimataj
veteranoj: "Ĉineskoj venas!"

Ne aŭ neniam finiĝos la verda laboro de nia
diligenta kolegaro. Ni kredas ke, kune kun
partopreno de pli multaj homoj en la kultivado,
la semoj de ĉineskoj certe sane kreskos kaj
disfloros en la ĝardeno de cent floroj de
Esperanta poezio, aldonante belon per sia
bonodoro kaj ĉarmo. Ni fosu nian sulkon kun
kora bondeziro ke la bela espero de William
Auld efektiviĝos kiel eble pli frue.

Notoj

- (1) AULD, William. La Fenomeno Esperanto. UEA, 1988, p.30
- (2) La Unua Libro de Esperanto.
- (3) K.Kalocsay. Ligvo Stilo Formo. ofseta eldono de Librejo PIRATO, 1963, p.46
- (4) G. Waringhien. Beletro, sed ne el Katedro, FEL 1987, p.147
- (5) G. Waringhien. Beletro, sed ne el Katedro, FEL 1987, p.147
- (6) Hu Guozhu. Esperanta Metriko. HEA 1983, p.157
- (7) Saluton al la Suno. p.68
- (8) Saluton al la Suno. p.83
- (9) Penseo, n-ro 5, p.4
- (10) Preludo, n-ro 24, p.9~10. La serio konsistis el 4 ĉineskoj "Sopiro al Fora Homo", "Kora Sento", "Korva Krio en Nokto" kaj "Lanta Sontreniĝo", kun intence elektitaj titoloj konforme al la funebra atmosfero.
- (11) Internacia Pedagogia Revuo, n-ro 4/1989 .p.6.
- (12) Fonto, n-ro 166, p.11
- (13) Lu Jixin:Invit' al ĉinesko .Serio de VoKo-numero 13, Breda (Nederlanda), 1995
- (14) Fonto, n-ro 175. p.28.
- (15) Penseo. n-ro 12 (1991-06) ,p.4.
- (16) Ĉar la <Libro de Poezio>, la plej frua poemkolekto en Ĉinio, kaj la tre populara <300 poemoj de Tang-dinastio> kc enhavas 300 poemojn, tial ĉinoj rigardas tiun nombron mejloŝtona por poemkolektoj.

